

# EL POPOLA

中國報

12 1984



# Nacifesta Ceremonio


Fotoj de ŜIN HŪA kaj LAŪ BAJ

La unua de oktobro 1984 estis la 35-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Sur Tjan'anmen-placo de Pekino okazis grandioza militista kaj civitana parado kun partopreno de 500 000 homoj.

Ĝojkrio







Partiaj kaj ŝtataj gvidantoj de Ĉinio kaj alilandaj gastoj sur Tjan'anmen-pordego



La strategi-misila trupo en revuo





Diversnaciecaj popolanoj en festa kostumo en parado

Koloraj drakoj dancas sur la placo.







Marŝantaj sportistoj



Infanoj kaj iliaj gepatroj en festado

Junulinoj en la festa ceremonio



Nokto de la Nacia Festo





Ĝenerala distribuanto:

Monata gazeto eldonata de  
ĈINA ESPERANTO-LIGO  
P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio  
(GUOJI SHUDIAN)  
Esperanta Sekcio  
P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

## Enhavo

### SUR LA KOVRILO:

Geknaboj festantaj la Nacian  
Feston

de ŜIN HŬA

### SUR LA DORSKOVRILO:

Persikflora Valo (Ĉinstila pen-  
traĵo)

de ŬANG ĈAŬ

### KOLORAJ SERIOJ:

Nacifesta ceremonio

Mirindaĵoj de karsta kaverno en  
Gujĝoŭ-provinco

Fotoj faritaj de esp-istoj

Ĝjajugŭan-pasejo

El la "Kanto pri la Ĉina Revolu-  
cio"

### NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Renkontiĝo de ĉinaj kaj japanaj  
gejunuloj

Gejunuloj de Pekino en aŭtunaj  
vestoj

Por paco kaj amikeco en la 21-a jarcento . . . . .	2
Renkontiĝo de ĉinaj kaj japanaj esperantistoj . . . . .	5
Sude kaj Norde de la Granda Muro (12): Granda Muro, dankon pro via edifo . . . . .	50
Forstokultura kompanio administrata de kamparanoj . . . . .	9
"Fabriko de kraboj" . . . . .	10
Laŭmodaj vestoj bonvenaj en Pekino . . . . .	37
Kuna deklaro de Ĉinio kaj Britio pri la problemoj de Hongkong . . . . .	12
Leteroj inter du mondekstremoj pri Esperantologio . . . . .	17
POR KOMENCANTOJ: Neniam forgesbla rakonto . . . . .	19
NIAJ PERANTOJ: Por distribui Esperantajn eldonaĵojn . . . . .	20
ESP-NOVAĴOJ . . . . .	23
Vizito al la naskiĝloko de Konfuceo . . . . .	24
VIDINDAJ LOKOJ: Ĉarma pejzaĝo de karstaj kavernoj de Gujĝoŭ . . . . .	27
Ĉinio savas grandajn pandojn . . . . .	28
Lerta ĉasisto . . . . .	31
Lulilo de muzikistoj . . . . .	33
Kelkaj antikvaj ĉinaj fabloj . . . . .	36
Kvin principoj — la baza garantio por defendi la modpacon . . . . .	38
MIA VIVO: La patrolando en mia koro . . . . .	40
5 000 JAROJ DE ĈINIO: Kulturo de la dinastioj Ming kaj Ĉing . . . . .	43
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: La nomoj de ĉinoj . . . . .	15
POR VIA SANO: Memmasaĝo . . . . .	47
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	14
ĈINLINGVA KURSO: Dekunua leciono . . . . .	49
INTER NI: Ni havas monatan Esperantan kunsidon . . . . .	48
KORESPONDI DEZIRAS . . . . .	46

# Por Paco kaj Amikeco en la 21-a Jarcento

— PRI VIZITO DE 3 000 JAPANAJ JUNULOJ AL ĈINIO

**I**NVITITE de Hu Jaŭbang, ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, pli ol 3 000 japanaj junuloj sinsekve venis al Ĉinio en la lasta tagdeko de septembro. En la daŭro de duonmonato ili vizitis pli ol 200 fabrikojn, vilaĝojn, lernejojn, instituciojn kaj loĝejojn en Pekino, Ŝanhajo, Hangĝoŭ, Nankino, Ŝji'an kaj Uhan. Tie ili faris amikan renkontiĝon kun centmiloj da ĉinaj junuloj. Tio estas ne nur senprecedenca en la historio de

Ĉinio kaj Japanio, sed ankaŭ iniciativo en la historio de internacia kontaktiĝo.

## PRINTEMPO EN LA JUNULARA DOMO

La unua grava aktivado de la amika renkontiĝo de ĉinaj kaj japanaj junuloj okazis en la Junulara Domo de Ŝanhajo, kie prezentigis maro de floroj kaj mondo de lanternoj. Kiam japanaj junuloj, kiuj la unuaj atingis Ŝanhajon, eniris en la Junularan Domon, fanfaro de mezlernejoj

ekludis gajan muzikon. Ĉinaj junuloj en kostumoj de ĉinaj tradiciaj operoj salutis la gastojn.

Aktivadoj kun apartaj gustoj iris en ĉiuj kvin etaĝoj de la domo. En la ĉefa halo ĉinaj kaj japanaj junuloj gaje dancis. En la konkursejo "Kiu kantas plej bele?" amatoraj kantistoj de la du landoj sinsekve prezentis sian voĉon. Antaŭ servotablo de artaĵoj japanaj amikoj estis ravitaj de ĉinaj papertranĉaĵoj kaj homfiguraj skizoj. La dulandaj filatelistoj faris korverŝan konversacion

*Ĉinaj kaj japanaj gejunuloj en Hŭagang-parko de Hangĝoŭ*





en la malgranda ekspozicio de memorigaj poŝtmarkoj por la amikeco inter la ĉinaj kaj japanaj junuloj. Absorbite kiel infanoj, la junuloj ĵetis ringojn al argilaj beboj.

La ŝanhajaj koloraj lanternoj ekzistas jam de antaŭ mil jaroj. En la eksponejo de tiaj lumigataj lanternoj japanaj amikoj estis ravitaj de lanternoj en bird- kaj best-figuroj, lanternoj kun turniĝantaj paperaj homaj kaj bestaj figuroj, lanternoj en formoj de pavilono, kiosko kaj turo, kaj ankaŭ novtipaj murlampoj. En te-trinkejo japanaj junuloj kaj novaj konatoj ĝuis bongustajn lokajn manĝaĵojn. En aliaj lokoj oni interŝanĝis librojn kaj pentraĵojn, faris floranĝon kaj solvis enigmojn. Ĉie estis homoj. Japanaj amikoj diris kun ĝojo: “Estas bela la unua vespero en Ŝanhajo.”

### VIZITO AL KAMPARANOJ

Frumatene, kamparanoj de 14 distriktoj en la antaŭurbo de

Ŝanhajo sin preparis por bonvenigi junajn japanajn senditojn.

En la ora aŭtuno la kampoj estis kovritaj de verdaj legomoj, bonodoris fruktoj. Japanaj junuloj estis tuj ravitaj de la idilia pejzaĝo. Membro de la Delegacio por Japana-Ĉina Ĉiugeneracia Amikeco diris al mi: “Sen rigardo de ĉina vilaĝo, oni ne vidis la veran Ĉinion.”

En la vilaĝoj japanaj junuloj estis varme bonvenigataj de ĉinaj junaj kamparanoj. La gastigantoj tamtamis kaj tamburis kaj veturigis japanajn junulojn per boatoj por konduki ilin en siajn domojn, kies mastrinoj akceptis la lastajn. Tio mirinde impresis la gastojn. Dek aktorinoj de la Japana Filma Junulara Delegacio prezentis demandojn sinsekve al iu dommastrino. Unu el ili diris: “Virinoj devas vivi en Ĉinio, ĉar la ĉinaj virinoj havas la plej altan pozicion de la socio kaj estas la plej feliĉaj en la mondo!” Ĉiuj aliaj junulinoj ekridis de tio.

*Japanaj junuloj varme bonvenigataj de urbanoj de Uhan*



Tagmeze kamparanoj regalis la gastojn en siaj hejmoj. Japanaj amikoj tre volontis ĝui tian kamparanan vivon. Iu diris: “Unuafoje en mia vivo mi manĝis tiel multajn ĉinajn pladojn. La tagmanĝo en kamparana domo estos neforgesebla dum mia vivo. La gastoj faris al kamparanoj diversajn demandojn pri kultivado, proporcio inter enspezo de agrikulturo kaj tiu de kromokupoj, redukto de diferencoj inter riĉaj kaj malriĉaj kamparanoj, ktp. Japanaj gastoj miris, ke plejparto de la kamparanoj havas novan duetaĝan domon, ĝardeneton, kranakvon, novajn meblojn, magnetofonon, televidilon kaj lavmaŝinon. Iu japana juna oficisto diris kun starigita dikfingro: “Bone, bonege, ĉinaj kamparanoj ekmarŝas al moderna vivo!”

### AMIKECO ĈE LA OKCIDENTA LAGO

“Hangĝou — paradizo”, japanaj gastoj ekkriis ĝoje ĉe la Okcidenta Lago, kies pitoreskan pejzaĝon nemalmulte da japanaj amikoj deziris rigardi jam antaŭlonge.

Tiutage la lago aspektis pli ĉarma. Ĉinaj kaj japanaj junuloj veturis en plezurboatoj. Sur la vasta lago sportistoj prezentis por ili kajakadon, veladon kaj motorboatadon. Aktoroj de la Hangĝou-a Ensemblo dancadis kaj kantadis sur la surakva scenejo. Kortuŝite de la bela pejzaĝo kaj sincera amikeco de ĉinoj, kelkaj japanaj knabinoj ne povis sin deteni de kantado kaj dancado. Aparte vigliĝis iu japana knabino. En sia aĝo de 16 jaroj ŝi aktoriĝis kaj ludis sinsekve en 20 filmoj kaj televidaj filmoj. Ŝi diris al mi: “De la infanaĝo mi ŝatas ĉinajn morojn kaj ĉinojn. Nun la ĉina popolo tiel varme akceptas nin, kio tre kortuŝas



*Japanaj filmaktori-  
noj ĝoje kantas ĉe la  
Okcidenta Lago de  
Hangôŭ.*

min.” Ŝin altiris ĝojkrio, de la insuleto meze de la lago, fajraĵoj pafiĝis en la ĉielon, pli ol du mil kolomboj flugis kaj koloraj balonoj ŝvebis supren en aero.

### “TIA ESTAS PEKINO!”

Amikoj de la Junulara Delegacio de la Nara-a Registaro diris: “En Japanio ni ofte aŭdis pri Ĉinio kaj ĉinaj junuloj kaj ofte legis pri Ĉinio. Kia do Ĉinio estas? Pri tio ni sciis preskaŭ nenion. Ĉi-foje ni finfine venis al Pekino. De la flughaveno ĝis la hotelo ni vidis purajn stratojn kaj altajn domojn, kiuj freŝe impresis nin. Ho! Bonege, tia estas Pekino!”

La Junulara Delegacio de Japana Tutlanda Subdistrikta Asocio vizitis emeritan laboriston Hŭang Joŭĝu, en kies familio tri generacioj vivas harmonie. Iu iom pliaĝa membro de la delegacio diris kortuŝite: “Nun en Japanio tia familio estas apenaŭ trovebla. Plenkreskinte, la gefiloj forlasas sian hejmon. Tre kompatindas la maljunuloj, kiujn turmentas soleco. Mi tre envias al vi tiun vian tradician virton.” Estro de la Japana Labora Delegacio Natisaŭa diris: “En 1972

mi vizitis Pekinon, sed la hodiaŭa Pekino multe ŝanĝiĝis. Ŝanĝiĝis moroj, ŝanĝiĝis ankaŭ la vestoj. Pekino, ĉie vegleclena, impresas vizitantojn per pureco, senĝeneco kaj sekureco.”

### KUNE PASIGI FESTON

La 1-an de oktobro ĉie en Pekino bonodoris freŝaj floroj kaj ondiĝis maro de flagoj. 5-kilometra Ĉang’an-strato saturiĝis de gajeco. La 3 000 japanaj junuloj, kune kun pekinanoj, pasigis la Nacian Feston de la ĉina popolo.

Je la 10-a antaŭtagmeze komenciĝis la soleno. Kiam Deng Ŝjaŭping, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj prezidanto de la Centra Milita Komisiono, aŭte veturis al Tjan’anmen-placo, japanaj junuloj kaj ĉinaj reprezentantoj sur la revuaj podioj varme manklakadis. Iu knabino el Hiroŝima diris: “Kiam Deng Ŝjaŭping vizitis Japanion, mi vidis lin en Tokio. Li estas ankoraŭ tiel sana, kion mi ne atendis”.

La japanajn gastojn profunde kortuŝis la diversprofesiaj paradantoj, plenaj de viveco kaj mem-

fido. Onodela Kijiĉiro, ĝenerala reprezentanto de la japana organiza komitato de la Japana-Ĉina Junulara Interfluo, diris: “Kvankam mi ne povas amikiĝi kun ĉiuj ĉinoj, tamen post la revuado mi vidis kvazaŭ ĉion en Ĉinio kaj amikiĝis kvazaŭ kun miliardo da ĉinoj.”

Posttagmeze japanaj amikoj vizitis Ĝongnanhaj, la sidejon de la Centra Komitato de KPC kaj la Ŝtata Konsilantaro post la fondiĝo de la nova Ĉinio. Hu Jaŭbang, Deng Jingĉaŭ kaj aliaj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj intervidiĝis tie kun reprezentantoj de la japanaj junuloj kaj kun japanaj amikoj de maljuna generacio, kiuj kontribuis al la amikeco inter Ĉinio kaj Japanio. Post la intervidiĝo, akompanate de Hu Jaŭbang ili ekskursis en Ĝongnanhaj. Ili rigardis kaj konversaciis gaje. Japana amiko Hirai diris sentoplene: “En la mondo la popoloj de Japanio kaj Ĉinio povas tiel intime kontaktiĝi kiel fratoj!”

Vesperiĝis. Japanaj junuloj venis denove al Tjan’anmen-placo por partopreni en la kuna festado de miliono kaj kvincent miloj da pekinanoj. Ili kaj ĉinaj junuloj dancadis mano en mano. Buntaj



# Renkontiĝo de Ĉinaj kaj Japanaj Esperantistoj

**T**RI mil japanaj gejunuloj vizitis Ĉinion. Inter ili troviĝis kvin-persona junulara delegacio de la Japana Esperanto-Instituto kun s-ro Saitô Hirosi kiel estro. En la vespero, kiam ili alvenis al Ŝanhajo, mi vizitis ilin en la hotelo Haj'ou. Kiam mi salutis ilin en Esperanto kaj prezentis min,

ke mi estas raportistino de El Popola Ĉinio, ili ekĝojis kaj premis al mi la manon, kvazaŭ revidante bonan amikinon post longa disiĝo.

S-ro Saitô Hirosi diris al mi, ke post descendo de la aviadilo la unua afero por ili estas serĉi ĉinajn esperantistojn, ĉar ili dezi-

ras konversacii kun ili en la komuna lingvo.

Baldaŭ realiĝis ilia deziro. Antaŭtagmeze de la 26-a de septembro, la japanaj gastoj kaj junaj esperantistoj de Ŝanhajo ĝoje renkontiĝis en la parko Hongkoŭ. Ili unue ĉeestis en la parko la inaŭguran ceremonion

---

fajraĵoj intensigis etoson de la festo. Japanaj junuloj diris al ĉinaj amikoj, ke ankaŭ la fajraĵoj rilatas al la amikeco inter Ĉinio kaj Japanio. Japanaj fajraĵoj estis enkondukitaj el Ĉinio kaj poste fariĝis nemankigeblaj al japanaj someraj festoj. Iu japana junulo diris, ke la brilo de la fajraĵoj povas estingiĝi, tamen la amikeco restos ĉiam en la koro.

## EKSKURSI SUR JANGZI-RIVERO EN NOKTO

La popolo de Uhan ĉe Jangzi-rivero aranĝis interesan aktivadon ekskuri sur la rivero en nokto.

Du ŝipoj kun lanternoj kaj koloraj rubandoj, plenaj de amikeco, malrapide debordiĝis kaj veturis orienten fendante onda-

ron. En tiel bela nokto Uehara Saĉihiko, juna reprezentanto de la registaro de la gubernio Gunma, diris: "Mi venis al Ĉinio por rigardi Tjan'anmen, la Grandan Muron kaj Jangzi-riveron. Nun mia deziro realiĝis."

Hu-u-u! Kiam la ŝipoj veturis preter la kajo de Uhan, centoj da ŝipoj ĉe la kajo preskaŭ samtempe fajfis unu minuton por saluti la amikojn. La akuta, forta fajfado ŝvebis kaj eĥis super la akvo kaj tuŝis la korojn de niaj gastoj.

En kajutoj, sur ferdekoj, la novaj amikoj bedaŭris la baldaŭan adiaŭon. Ili montris sian amikan senton pere de interpretistoj, pli multe per kelkaj ĵus lernitaj ĉinaj aŭ japanaj vortoj aŭ per skribaĵo kaj mangestoj. Japana studento de jura fakultato

Jikeda Dajsaku konversacii kun mi. Mi demandis lin pri lia impresado pri Ĉinio, li diris: "Ŝajnas, ke ni feste pasigas ĉiun tagon, sed bonvenigaj ceremonioj estas multekostaj kaj oftégaj. Mi preferus konversacii kun ordinaraĵoj popolanoj kaj profunde interkompreniĝi." Montrante la torentan riveron, li diris: "Mi esperas, ke la amikeco inter Japanio kaj Ĉinio ĉiam torentos kiel Jangzi."

Tuj poste, la fajraĵoj, simbo-lantaj la brilan estontecon de la amikeco inter Ĉinio kaj Japanio, ruĝigis la ĉielon. En la vasta kajuto la dulandaj junuloj ekdancis laŭ gaja melodio.

Kantu, dancu, plenverve! Ni deziras, ke la amikeco semita kune de ĉinaj kaj japanaj junuloj en Ĉinio abunde fruktu en la 21-a jarcento!



*S-ro Ŝju Sanŝu (dekstre), respondeculo de EPĈ, donacas pentraĵon al japanaj esperantistoj.*



*La 16-jara Usui Hiroyuki konigas al ĉinaj amikoj pri siaj lernado kaj vivo.*

de la horloĝa piedestalo memore al la amikeco inter la ĉinaj kaj japanaj gejunuloj, kaj poste kunsidis ĉirkaŭ tablo sur la gazono antaŭ la muzeo de Lusin. En la nomo de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio ĉina esperantisto Ŭang Minhaŭ donacis al la gastoj silkan flagon kaj s-ro Saitō Hirosi

siaflanke donacis Esperantajn librojn al la Ŝanhaja Esperanto-Asocio, reprezentante 13 Esperantajn organizaĵojn kaj personojn de Japanio. La dulandaj gejunuloj havis inter si korverŝan konversacion en Esperanto. La parol-temoj estis multflankaj. Ili parolis pri siaj vivo, lernado kaj

laboro kaj interŝanĝis sperton en la lernado de Esperanto. Tri junulinoj flustre babilis en granda intimeco, kaj mi senprokraste fotografis tiun scenon, poste ankaŭ mi partoprenis en ilia konversacio.

Japana esperantistino Sakamoto Yuri estas studentino vigla. Kun nigra hararo longa ĝis la ŝultroj kaj paro da grandaj, bele brilaj okuloj kaj en simpla vesto, ŝi elspiras grandan entuziasmon. Ŝi parolas Esperante tre flue. Ŝi diris, ke ŝi havas naturan inklinton al Esperanto. Ŝia patro estas veterana esperantisto kaj tenas intiman rilaton kun ĉina veterana esperantisto Zensto. Ŝi komencis lerni Esperanton antaŭ tri jaroj. Post lernejoj lecionohoroj ŝi vizitis Esperanto-kurson proksime al la hejmo. En 1983 ŝi proprapage vojaĝis al okcidenta Eŭropo kaj vizitis familiojn de iuj esperantistoj, dank' al kio ŝi ekzercis sian parol-kapablon kaj amikiĝis kun multaj samideanoj.

“Kiel vi aliĝis al la vizitgrupo al Ĉinio?” ŝin demandis ŝanhaja junulino Ŭang Ĝing. Sakamoto Yuri diris, ke tre multaj anoncis sin por viziti Ĉinion. La Japana Esperanto-Instituto per telefono ekzamenis ĉiun anoncinton pri lia Esperanta parolo kaj poste postulis, ke li skribu unu artikolon en Esperanto sub la titolo “Kial vi anoncis vin por iri al Ĉinio?” Informiĝinte, ke ŝi estas elektita, ŝi emociiĝis preskaŭ ĝis larmoj. Tion dirinte, ŝi metis ambaŭ manojn sur la bruston kaj daŭrigis kun brilantaj okuloj: “Mi venis en Ĉinion kaj vidis ĉinajn Esperant-amikojn kvazaŭ en sonĝo. Vere bone estas, ke ni havas komunan lingvon kaj vere ĝojinde, ke ni parolis en Esperanto pri multaj aferoj.”

En Fudan-universitato, la kvin japanaj geesperantistoj estis var-



me bonvenigataj de instruistoj kaj lernantoj de la nedeviga Esperanto-kurso. La kursanoj komencis lerni Esperanton antaŭ nelonge kaj helpe de la instruisto ili konigis siajn ŝatokupojn kaj postlecian vivon.

S-ro Saitô Hiroshi kaj membroj Kanô Humihiko kaj Watanuki Kenitiro partoprenis en celebrado de la 20-a datreveno de la naskiĝo de sep ĉinaj studentinoj en iu loĝĉambro. Ili aparte elektis la tagon, en kiu la japanaj amikoj vizitis Ĉinion, por festi sian naskiĝtagon. Ili invitis la gastojn bruligi la kandelojn sur la jubileaj tortoj kaj poste kune kun la lastaj blovestingis ilin per unu spiro. Manĝante la tortojn, la gastigantoj kaj gastoj ekkantis la japanan kanton "Kanto de Junuloj".

Akompanate de laboranto de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio, la kvin japanaj geesperantistoj rigardis la malnovan loĝejon de fama japana esperantisto Verda Majo en Ŝanhajo kaj tie estis

varme bonvenigataj de s-ro Ŝjan Ŝjiĝja, ŝia malnova amiko kaj vicprezidanto kaj ĝenerala sekretario de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio. Li konigis pri la aktivadoj de Verda Majo en Ŝanhajo kaj respondis demandojn de la gastoj.

Tri tagojn poste, la kvin japanaj geesperantistoj, kune kun la unua amika vizit-grupo el 700 japanaj gejunuloj, trajne veturis al la urbo Hangĝoŭ. Ili sidis en la kvina vagono. Survoje la junuloj en la vagono sin amuzis per transdono de floro en akompano de tamburado. Kiam mi enpaŝis en la vagonon, la floro estis ĝuste transdonita en manon de japana esperantisto. Laŭregule, la tenanto de la floro devis kanti, sed la kvin japanaj geesperantistoj kune prezentis la japanan popolkanton en Esperanto "Kanto de la Kvar Sezonoj". Ilia bela voĉo rikoltis varman aplaŭdon de la tuta vagono. La prezidanto de la amuzado premiis ilin ĉiujn. Iuj japanaj junuloj scivole demandis ilin:

"Ĉu Esperanto estas facile lernebla?" Aliaj simple petis instrui la salutesprimon en Esperanto. Tuj laŭta "saluton" aŭdiĝis en la tuta vagono.

En Hangĝoŭ tiuj kvin japanaj gejunuloj konatiĝis kun novaj Esperanto-amikoj. Ili renkontiĝis en malgranda halo de la Geknaba Palaco de la urbo. Laŭ la aranĝo de la programo, ili devis unue spekti amuzan prezentadon de geknaboj kaj poste interparoli inter si. Tamen, tuj ĉe la ekvido la esperantistoj de la du landoj ne povis sin deteni de emocio kaj fervore ekflustris dum la spektaklo. La gvidistoj komprenis ilian senton kaj pli frue kondukis ilin al la kunsidejo. Mi demandis paroleman Watanuki Kenitiro: "Kial vi tiel ŝatas konversacii?" Li respondis, ke ili ŝatas interparoli kontaktiĝon, ĉar la celo de ilia vizito al Ĉinio ja estas koni pri la disvastigo kaj uzo de Esperanto en Ĉinio kaj amikiĝi kun kiel eble plej multaj esperantistoj. Tial ili volas utiligi ĉiun tempe-



*Intima interparolado en Esperanto*

ton por fari duopan aŭ triopan konversacion. La esperantistoj de la du landoj intime babilis, ridadis kaj reciprokis donacetojn kaj adresojn.

La amika renkontiĝo de la kvin japanaj geesperantistoj kun pekinaj samideanoj estis kulmino de ilia restado en Ĉinio. Je la dua posttagmeze de la 30-a de septembro, Saitô Hiroshi kaj la aliaj kvar membroj venis en la oficejon, kie sidas la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la redakcio de El Popola Ĉinio. Ilin varme bonvenigis pli ol tridek esperantistoj de ĈEL, EPĈ, Radio Pekino, la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio kaj la Pekina Esperanto-Asocio. Ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo Ĝang Ĉjiĉeng kaj gvidanto de EPĈ Ŝju Ŝanŝu faris entuziasman parolon kaj donacis al la gastoj vortarojn, librojn, albumojn kaj delikatajn memoraĵojn. Ankaŭ s-ro Saitô Hiroshi parolis en la kunveno. 24-jara, li estas oficisto de la religia jura personeco Oomoto. Antaŭ kvar jaroj li komencis lerni Esperanton kaj havas kontaktojn kun multaj japanaj esperantistoj. Li diris je la fino, ke la solena kaj varma bonvenigo de pekinaj esperantistoj estas ekster ilia atendo kaj tre ĝojigas ilin.

Tuj post la bonveniga ceremonio, la junuloj de la du landoj grupiĝis por konversacio. Ili konigis unu al alia siajn nomojn, profesiojn kaj ŝatokupojn. Iuj ĉinaj junaj esperantistoj, kiuj malofte havas okazon buŝe praktiki Esperanton kaj ne kuraĝas paroli, estis forte emociitaj de la varma atmosfero kaj iniciateme ekparolis kun la gastoj. La japanaj junuloj diris, ke ili tre interesiĝas pri la artikoloj en la gazeto EPĈ pri la lernado, vivo kaj amfero de ĉinaj junuloj. Probable Watanuki Kenitiro estas la plej vigla el la kvin japanaj junuloj. Li estas junulo pripensema kaj diskreta. Li levis multajn demandojn al la ĉinaj esperantistoj. En Japanio li lernas la anglan lingvon, tamen li havas apartan entuziasmon por Esperanto. Li aliĝis al la du japanaj Esperanto-organizaĵoj Rondo Harmonia kaj Japana Esperanto-Instituto. Li diris, ke en Japanio li jam aŭdis, ke en Ĉinio dekmiloj da homoj lernas Esperanton, nun li propraokule vidis tiel multajn esperantistojn, kiuj bone parolas Esperante kaj ĝuste pro tio li tre ĝojas.

Poste la gastoj kaj gastigantoj veturis al la hotelo Ŝjangŝan, nove konstruita en la okcidenta

antaŭurbo de Pekino, por kune preni tie vesper-manĝon. Ĉirkaŭ longa tablo plene kovrita la du landaj esperantistoj tostis, esprimante bondezirojn unu al alia. Intertempe ĉinaj esperantistoj-artistoj kantis kaj dancis por la japanaj amikoj. Ankaŭ la japanaj gastoj prezentis japanajn kantojn. De tempo al tempo eksplodis manklakado kaj gaja ridado. Fine, la gejunuloj de la du landoj ĝoje dancis la japanan dancon "Manklakado".

La nokta vualo silente falis, venis tempo adiaŭi. Sed la novaj amikoj de Ĉinio kaj Japanio dromis en fervora interparolado kaj ne volis disiĝi unu de alia, malgraŭ ke la gvidistoj foje kaj refoje urĝis enaŭtiĝi. Post plia duonhora ili finfine diris adiaŭon unu al alia.

La 3-an de oktobro, kunportante profundan korinklinon kaj amikecon de la esperantistaro kaj junularo de Ĉinio, la japanaj junaj geesperantistoj forlasis Ĉinion. La disiĝo okazis sen malĝojo, ĉar ĉiuj bone memoras la vortojn de s-ro Saitô Hiroshi: "Atendu, ni revenos du jarojn poste al la 71-a Universala Kongreso en Pekino. Ni diras ne adiaŭon, sed ĝis-revidon!"



*Renkontiĝo de japanaj esperantistoj kaj ĉinaj studentoj*





*Li Fujun kaj lia forsto*

# Forstokultura kompanio administrata de kamparanoj

de JANG LIĜJUN

**L**A vilaĝo Bjanĉjangzi estas plej malgranda, kun ses familioj dislokitaj en valetoj ĉirkaŭita de montoj en antaŭurbo de Pekino. Ĝuste en tiu nekonata montvilaĝo aperis lertulo pri forstokulturado en la dezerta montaro. Li nomiĝas Li Fujun.

Li Fujun aĝas pli ol 50 jarojn. Dum pli ol 20 jaroj li funkcias kiel estro de produkta taĉmento. En tiuj jaroj, influate de la "maldekstra" penso, oni ĉiam emfazis unu-nuran kultivadon de grenplantoj, sed neglektis diversan ekonomion laŭ lokaj kondiĉoj, por disvolvi produktadon en la kamparo. Tial, la vilaĝanoj ne nur ne bone utiligis la antaŭajn arbarriĉfontojn, male, pro multjara konstruado de digetoj por kultivi grenplantojn, la montoj fariĝis pli kaj pli kalvaj, kaj rezulte, la vilaĝanoj vivis mizeran vivon. Li Fujun, kvankam multka-

pabla, havis neniun ŝancon montri sian talenton.

Depost 1978, la ĉina registaro, laŭ siaj realaj kondiĉoj, iom post iom moderigis la politikon pri la kampara ekonomio. Dank' al tio, Li Fujun gvidis vilaĝanojn por arbarizi la montaron kaj flegi fruktarkojn. En tri jaroj ili arbarizis pli ol 330 hektarojn kaj la pokapa enspezo de la vilaĝo pliiĝis 5-oble.

En 1983, kiel aliaj vilaĝoj en Ĉinio, la respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado estis praktikata en Bjanĉjangzi. Li Fujun kontraktis pri arbarizo de 100 hektaroj da montoj kaj subskribis la produktokontrakton kun la subdistrikta forstumkompanio.

Pro manko de laborfortoj Li Fujun dungis ĉirkaŭ 100 kamparanojn el la antaŭurbo kaj aliaj

provincoj kaj fondis la forstokulturatan kompanion. Li difinis, ke ĉiu dungito estas libera ĉesigi sian dungitecon. Li dividis ilin en kelkajn labor-grupojn, kiuj estis organizitaj laŭ memvoleco de dungitoj. Ili elektis sian estron kaj ellaboris labor-sistemon. La dungitoj laboras en malsamaj formoj de kontrakto, laborkvoto aŭ taglaboro kaj ricevas salajron aparte. La familianoj de Li Fujun ĉiu havis sian propran postenon. Li Fujun laboris kiel direktoro de la kompanio, lia edzino okupiĝas pri ilia loĝado kaj manĝaĵoj, lia filo pri eksteraj aferoj kaj lia filino pri aĉetado de materialoj.

Kiam mi vizitis lian hejmon, mi trovis, ke en la korto okulfrappe staras ses kaldronoj. Ĉar la dungitoj loĝis kaj manĝis senpage krom ricevi salajron.

Li Fujun opiniis, ke plejparto de tiuj laborantoj venis el malriĉaj

lokoj, kvankam ili ne estas elektemaj pri manĝaĵo, tamen li devas juste trakti ilin tiuflanke. Tial li ofte diris al sia edzino, ke ŝi plibonigu al ili manĝaĵon, por ke ili ĉiuj bone kaj sate manĝu. Li ofte diris al laborantoj: “Se vi havas malfacilaĵon aŭ malkontentaĵon, diru rekte, mi certe helpos vin laŭ mia povo.” Vidinte, ke Li Fujū estas afabla, la laborantoj prenis la kompanion kiel sian propran hejmon.

Por certigi la forstokulturan kvaliton, Li Fujū antaŭ laboro ĉiam donis demonstradon kaj post laboro faris rigoran kontrolon. La laborantoj venis el diversaj lokoj kaj posedas malsamajn metodojn planti arbidojn, tial komence iuj ne al kutimiĝis al la difinitaj postuloj. Tiukaze Li Fujū pacience klarigis al ili la lokajn klimaton, grundon kaj apartajn karakterizaĵojn de arba kreskado. Iom post iom, la forstokultura kvalito estis certigita, kaj la procentaĵo de la vivipovaj arboj atingis pli ol 80%.

La forstokulturo en nefekunda montaro ricevas profiton tre ba-

gatelan en la komencaj jaroj. Kiam la kompanio fondiĝis, Li Fujū prunteprenis dek mil jŭanojn kiel fundamentan elspezon de la kompanio, sed la monsumo ne sufiĉis por tiom da homoj. Tial, krom forstokulturado, Li kontraktis ankaŭ pri kelkaj fruktarbaroj kaj respondeca kampo, por ke ili ĉiuj faru agrikulturan kaj kromokupan laboron en la libertempo.

Unu jaron poste, la kompanio forstokulturis 130 hektarojn, ricevis subvencion de 13 000 jŭanoj laŭ kontrakto, 4 000 jŭanojn en administrado de fruktoĝardejoj kaj kolektado de sovaĝaj drogherboj kaj rikoltis 5 000 kg. da greno. Krome, ili vendis al la ŝtato 9 porkojn. Post dekalkulo de diversaj kostoj restis ĉe ili ankoraŭ pli ol 10 000 jŭanoj.

Ĉi-jare en la tuta subdistrikto de kelkaj kamparanaj familioj imitis lian ekzemplon. Li Fujū varme helpis ilin en laborfortoj kaj tekniko. Li havas pli grandan planon. En la komenco de la kuranta jaro li jam kolektis

20 000 jŭanojn kaj kun inĝeniera sekcio de fervoja konstruado faris kontrakton pri branĉa ŝoseo al ilia vilaĝo. Li pensis, ke tio eble ne donos profiton, sed eĉ malprofitigos al li, tamen tiu ŝoseo estos treege utila al ekspluatado de la mont-regiono.

Post tritaga pluveto la ĉielo fariĝis klara kvazaŭ lavita. Li Fujū akompanis min al la monteĝo malantaŭ la vilaĝo kaj malkaŝis al mi sian alian planon: “En nia vilaĝo troviĝas ankoraŭ 200 hektaroj da kalvaj montoj taŭgaj por forstokulturo. Ni deziras verdigi ilin en du jaroj, tamen ni strebas por plenumi tiun taskon en unu jaro. Post kiam la ŝoseo funkcios, mi aĉetos ŝarĝaŭton. Tiam ni faros prilaboradon de agrikultura kaj kromokupa produktaĵoj kune kun aliaj familioj. Kelkajn jarojn poste, arboj kreskos ĉie sur la montoj, birdoj kantos kaj floroj aromos en nia vilaĝo. Dank’ al tio, ne nur niaj samtempuloj vivos komforte, sed ankaŭ niaj posteuloj havos garantion en sia vivo.”

## “Fabriko de kraboj”

de LU JI

ĈU vi aŭdis pri kraba “fabriko”? Same kiel aliaj fabrikoj, ĝi havas domojn, maŝinojn, teknikistojn kaj inĝenierojn. . . Ĝiaj produktoj estas malgrandaj krabidoj, liverataj al diversaj lokoj por esti bredataj en lago.

Kiel oni povas “fabriki” krabojn, kiuj kutime vivas en rivero,

lago aŭ maro? Mi kun scivolemo vizitis la Ĉuŝjan-an Akvoproduktan Instituton en Anĥuj, land-interna provinco de Ĉinio. Ĝi apartenas al la kraba “fabriko” sur monteto, simila al duoninsulo, en granda akvokonservejo de la okcidenta antaŭurbo de Ĉuŝjan. Ĝi konsistas el domego por eksperimento, senkovra ba-

seno por pariĝo kaj artefarita marakva lago por bredado de krabidoj. Mi venis tien kaj vidis, ke kraboj vigle naĝas en la lago tien kaj reen.

Vicĉefinĝeniero Ĝaŭ Najgang, la estro de la instituto, konigis al mi, ke inter la fiŝistoj sude de Jangzi-rivero cirkulas la prover-



bo: "Okcidenta vento ekblovas, kraboj tuj ekskursas." Ĝi signifas, ke kiam fariĝas malvarme ĉe la fino de aŭtuno kaj komenco de vintro, la dujaraj kraboj, kiuj sekse maturiĝas en rivero aŭ lago, ekrapas laŭflue al la maro por pariĝi ĉe la enfluejo. Ili pariĝas tuj ĉe ektuŝo de marakvo kaj la femalaj demetas ovojn. Jen ĉefa kaŭzo, kial ili longe vojaĝas al malprofunda maro. Post kelka tempo iliaj idoj eloviĝas. Defaliginte la ŝelon, ili fariĝas junaj kraboj kun grandaj okuloj kaj jam povas iri al riveroj aŭ lagoj kontraŭ la fluo por tie serĉi manĝaĵon.

"Vi estas malproksime de maro, kiel do vi multigas krabojn?" demandis mi nekomprene.

"Artefarita marakvo helpas nin," respondis s-ro Ĝaŭ kaj kondukis min en iun ĉambron kun multe da pelvoj plenaj de akvo. En la akvo ŝajne estis malgrandaj vivaĵoj. Li diris, ke tio estas laboratorio por artefarita marakvo. Por ricevi tian marakvon, oni ĝenerale maldensigas salakvon en apudmara salfarejo. Tamen tia metodo estas tre malfacila por la landinterno pro longa transportado kaj granda kosto. Tial en 1974 la instituto unuafoje prezentis proponon bredi krabojn en artefarita marakvo. Tiu laboro estas tre komplika, ĉar oni ne povas prepari marakvon nur laŭ ĝiaj naturaj elementoj. La akvo ĉe enirejo havas kompleksan strukturon pro hidrologia, meteologia kaj kemia kaŭzoj, tial oni devas konsideri ĉion ĉi tion dum preparo de marakvo. La unua eksperimento ne sukcesis pro manko de sperto. La sekvantan jaron laborantoj de la instituto serioze konsultis materialojn pri akvo de Jangzi-rivero sub la helpo de instruistoj kaj studentoj de la ke-



*Basenoj el artefarita marakvo, en kiuj oni bredas krabidojn*

mia fakultato de la Nankina Universitato kaj unuafoje sukcesis fari marakvon. En la sama jaro ili kulturis 203 krabidojn en ĉiu kubmetro da marakvo. En eksperimentado en 1977 ili starigis la celon "arte fari marakvon kaj bredi krabojn en 'fabriko'". Por koni la vivon de kraboj kaj reformi la strukturon de baseno, ili tage kaj nokte faris observon ĉe la baseno. Ili trovis, ke krabo ŝatas ne nur fototropismon, sed ankaŭ senĉesan rampadon kontraŭ fluo. Laŭ tio ili reformis basenon en tiun kun fluanta akvo kaj bone sukcesis en bredado. En tiu jaro ili kulturis 12 615 krabidojn en ĉiu kubmetro da marakvo por unu fojo. Nun la nombro atingis 24 906.

Post paŭzo s-ro Ĝaŭ daŭrigis, ke la produktokvanto de krabidoj ne estas kalkulebla nur laŭ nombro de krabovoj, ĉar krabido devas multfoje defaligi sian ŝe-

lon dum sia kreskado. Post ĉiufoja ŝel-defaligo la tre junaj idoj kun mola krusto estas malfortaj kaj ne havas rezistan forton kontraŭ malfavora medio. Se ili estas atakitaj de malamikoj en akvo, ili perdos la vivon. Post eloviĝo kaj ŝel-defaligoj nur tre malmultaj el la centmiloj da krabovoj povas fariĝi krabidoj.

En tiu tago mi vizitis ankaŭ laborejon, kiu produktas manĝaĵon speciale por krabidoj, kaj rigardis aliajn ekipaĵojn de la "fabriko". Reveninte al la akceptejoj, mi demandis s-ron Ĝaŭ pri la signifo kaj ekonomia valoro de bredataj krabidoj. Li diris al mi, ke krabo estas ne nur bongusta, sed ankaŭ nutrica, kaj oni ĝin vaporumas, kuiras, fritas aŭ fritas kun faruno. Krome oni uzas ĝin kiel materialon por kukoj kaj faras el ĝi famajn ĉinajn pladojn kun legomoj. Nun ĝi estas bonvena al

# Kuna deklaro de Ĉinio kaj Britio pri la problemo de Hongkong

**L**A kuna deklaro de Ĉinio kaj Britio pri la problemo de Hongkong estis farita en la 26-a de septembro 1984 en la Popola Halo de Pekino.

Goŭ Nan, estro de la ĉina registara delegacio kaj vicministro de la Ĉina Ministerio de Eksteraj Aferoj, kaj Richard Evans, estro de la brita registara delegacio kaj brita ambasadoro al Ĉinio, subskribis la sankciotan deklaron, reprezentante siajn registarojn.

La deklaro anoncis, ke la ĉina registaro decidus rekomenci praktikadon de suvereneco super Hongkong en la 1-a de julio 1997 kaj la brita registaro samtage redonos Hongkong al Ĉinio. En la deklaro la ĉina registaro publikigis siajn fundamentajn politikojn pri Hongkong.

Por protekti la ŝtatan unuecon kaj la teritorian integrecon kaj konsiderante la historian fonon kaj la aktualan situacion, la ĉina registaro decidus, ke kiam ĝi restarigos sian suverenecon super Hongkong, ĝi starigos en Hongkong specialan administran regionon rekte sub la centra popola registaro, laŭ la 31-a artikolo de la Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko. La Hongkong-a

Speciala Administra Regiono ĝuos altgradan aŭtonomecon, krom la eksteraj kaj nacidefendaj aferoj prizorgataj de la centra popola registaro, kaj Hongkong estos administrotita de la lokanoj. La nunaj socia kaj ekonomia sistemoj kaj vivmaniero en Hongkong estos ne ŝanĝotaj. La fundamentaj politikoj de Ĉinio por Hongkong estos difinitaj laŭ la Fundamenta Leĝo de la Hongkong-a Speciala Administra Regiono ellaborota de la Tutlanda Popola Kongreso kaj validos por 50 jaroj. La praktikado de tiuj politikoj garantios la daŭran prosperecon kaj stabilecon de Hongkong post 1997 kaj plue disvolvos ĝian rolon de libera haveno kaj internacia financa kaj komerca centro, kio utilos kaj al la samlandanoj en Hongkong kaj al la socialisma moderniga konstruado de Ĉinio.

Nia politiko "unu ŝtato kun du reĝimoj" por Hongkong estas longdaŭra nacia politiko profunde konsiderita, konforma al postuloj de la unuigo kaj prosperigo de Ĉinio. La sukcesa solvo de la problemo pri Hongkong ankaŭ akcelos la revenon de Taj'ŭan al la patrolando.

La problemo pri Hongkong estas postlasita de la historio. De la antikveco la regiono de

---

pli kaj pli da konsumantoj. En Ĉinio estas multaj riveroj kaj lagoj. Se oni lasas en riveron aŭ lagon nur duonkilogramon da krabidoj, oni do ricevos jam 250-500 kilogramojn da maturaj kraboj. Pro la rapida disvolviĝo de la ĉina akvoutiliga afero senĉese plimultiĝis akvobaraĵoj kaj klu-

zoj, kiuj tamen obstrukcis la revenojn de kraboj. Pro tio parto da kraboj ne povas iri al enfluejo por demeti ovojn unuflanke, aliflanke nemalmultaj krabidoj ĉe enfluejo ne povas veni al riveroj aŭ lagoj por serĉi nutraĵon. Tial bredado de kraboj per artefarita marakvo kaj

konstruado de kraba "fabriko" fariĝas pli kaj pli gravaj por disvolvi krabobredadon en Ĉinio. La jara krabid-produktokvanto de la kraba "fabriko" eble superos dek milionojn. Nun tiu bredda metodo de la instituto estas disvastigata en pliaj provincoj en la landinterno.



Urbanoj de Pekino  
aĉetas ĵurnalojn kun  
kuna deklaro de  
Ĉinio kaj Britio.




Hongkong (inkluzive de Hongkong-insulo, Ĝiŭlong kaj "Novaj Teritorioj") estas teritorio de Ĉinio. Ĝi havas areon de 1 066 kvadrataj kilometroj kaj estis perforte okupita kaj luprenita de Britio per tri neegalaj traktatoj subskribitaj de Britio kaj la registaro de Ĉing-dinastio en la 19-a jarcento, inter ili la lutempo de "Novaj Teritorioj" kun areo de 946.4 kvadrataj kilometroj estas 99 jaroj, ĝis la 30-a de junio 1997.

Post la renverso de Ĉing-dinastio la registaroj de Ĉinio ne agnoskis la eternan suverenecon de Britio super Hongkong. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko la ĉina registaro multfoje deklaris sian starpunkton pri la problemo de


Hongkong, ke Hongkong estas ĉina teritorio, Ĉinio agas libere de la neegalaj traktatoj subskribitaj de la registaroj de Britio kaj Ĉing-dinastio kaj en la konvena tempo restarigos sian suverenecon super la tuta regiono de Hongkong.

Nun, konsiderante la ĝeneralan situacion, surbaze de amika kunlaboro kaj laŭ la spirito de interkompreno, Ĉinio kaj Britio finfine solvis la problemon pri Hongkong per traktado. La kuna deklaro devas esti ratifikita kaj validos de la tago, kiam Ĉinio kaj Britio interŝanĝos la ratifikilojn, kio devas esti plenumita antaŭ la 30-a de junio 1985 en Pekino.



Hongkong inkluzivas Hongkong-insulon, Ĝiŭlong kaj "Novajn Teritoriojn", kun totala areo de 1 061.8 kvadrataj km. (laŭ statistiko en 1981).

La areo de Hongkong-insulo ① estas 75.6 kvadrataj km., tiu de Ĝiŭlong (sude de la lim-strato) ② 11.1 kvadrataj km. kaj tiu de la regiono inter Ŝenĝen-rivero kaj lim-strato (inkluzive la proksimajn insulojn) ③ 975.1 kvadrataj km. (ekskluzive la polderon kreitan en la lastaj jaroj).



*Trefkruciĝo Sanjŭan*



### LA UNUA ALTE PRODUKTANTA OLEPUTO EN LA DELTO DE PERLO-RIVERO

**E**N septembro de la kuranta jaro la ĉina kaj usona petrolaj korporacioj boris en la delto de Perlorivero de Ĉinio la unuan oleputon produktantan ĉiutage 429 tunojn da nafto. La puto estas 120 kilometrojn oriente de Hajnan-insulo, sub la akvo 126 metrojn profunda. La borado daŭris de la 4-a de junio ĝis la 29-a de julio, kaj la borita profundeco estas 3 331 metroj.

Ĉinaj geologoj opinias, ke la malkovro de la strukturo Ŭenĉang-19-1 havas gravan signifon por petrolo prospektorado en la delto de la rivero, ĉar ĉirkaŭ la strukturo estas multaj utilaj strukturoj. Ili kredas, ke kun daŭra prospektorado la petrolo rezervo en la delto estos plene malkaŝita.

### LA UNUA 65 000-TONELA CISTERNŜIPO DE ĈINIO

La Ŝipkonstruejo de Daljan lanĉis en la 27-a de septembro la unuan 65 000-tonelan cisternŝipon de Ĉinio. La ŝipo projektita de la ŝipkonstruejo mem longas 231 metrojn, larĝas 35.6 metrojn kaj altas 18 metrojn. Ĝi estas la plej granda cisternŝipo en Ĉinio hodiaŭ. La ĉefa dizelo estas 17 820 ĉevalpovojn potenca. La ŝipo estas

ekipita per kompare avangardaj instalaĵoj kontraŭ eksplodo, fajrego kaj polucio.

La Ŝipkonstruejo de Daljan estas unu el la plej grandaj ŝipkonstruejoj en Ĉinio. En la pasintaj 35 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio la konstruejo fabrikis pli ol 2 000 ŝipojn.

Ĉi-jare la konstruejo subskribis kontraktojn kun Norvegio por fabriki du 69 000-tonelajn ŝipojn por rafinita petrolo kaj du 7 200-tonelajn rulsarĝajn ŝipojn.

### LA PLEJ GRANDA TREFKRUCIĜO DE ĈINIO

La plej granda trefkruciĝo Sanjŭan de Ĉinio estis finkonstruita kaj transdonita al trafiko. La trefkruciĝo sidas ĉe la nodo de tri gravaj aŭtovojoj en la orienta urboparto de Pekino. La tuta konstruaĵo okupas 350 000 kvadratajn metrojn kaj konsistas el 3 malgrandaj trefkruciĝoj kaj 5 alkondukaj pontoj. La totala surfaco de la pontoj okupas 1 100 kvadratajn metrojn kaj tiu de la vojoj 86 000 kvadratajn metrojn. Ĉe la trefkruciĝo estas 9 ŝtuparoj kaj 8 trotuaroj por pasantoj. Sur la trefkruciĝo lumas novtipaj kondensitaj lampoj sur 11 fosto.

### FONDIĜO DE KATOLIKA TEOLOGIA SEMINARIO EN PREPARADO

La unua katolika teologia seminario en la Nordokcidento de

Ĉinio estos fondita en Ŝji'an, la ĉefurbo de Ŝenŝji-provinco.

La preparadon prizorgas la patriotaj organizoj de katolikoj de la provincoj (aŭ aŭtonomaj regionoj) Ŝenŝji, Gansu, Ningŝja, Ĉinghaj kaj Ŝingĝang.

En Ĉinio nun estas tri milionoj da katolikoj, el kiuj kelkcent mil loĝas en la Nordokcidento. La seminario pretigos pastrojn por la Nordokcidento. Ĝi akceptos per rigora ekzameno 80 abiturientojn de 18 jaroj.

En kvar lernojaroj la studentoj lernos 15 objektojn, inkluzive teologion, eklezian historion, logikon, etikon kaj la Bibliion.

### HOSPITALO POR MALJUNULAJ MALSANOJ EN ĈANGŜA

En Ĉangŝa, la ĉefurbo de Hunan-provinco, fondiĝis en septembro la Hospitalo por Maljunulaj Malsanoj.

Nun 9.01 procentoj de la loĝantaro en la urbo estas pli-ol-60-jaraj maljunuloj. La hospitalo servas speciale al ili kaj havas 9 sekciojn de internaj malsanoj, ĥirurgio, hemoroidoj, akupunkturo, otorinolaringologio k.s.

Krom la kuracistoj de la hospitalo, ankaŭ aliaj 23 eminentaj kuracistoj de la urbo akceptas pacientojn en la hospitalo en regulaj tagoj.



# LA NOMOJ DE ĈINOJ

**L**A nomoj de ĉinoj ekaperis en la primitiva socio. La primitivaj nomoj estis klanaj nomoj de matriarkaj klanaj komunumoj. La Han-lingva ideogramo “姓” (familia nomo) konsistas el “女” (virino) kaj “生” (naski). En la primitiva socio, pro grandigo de klanoj en generado, la klanoj dividiĝis en kelkajn grupojn kaj ĉiu grupo havis apartan signon kiel nomon, kaj tiuj klanaj nomoj estis “氏”. “姓” estis originaj klanaj nomoj kaj “氏” estis nomoj de nove generitaj klanoj. En la dinastioj Ĉin kaj Han (221 a.K. — 220 p.K.) oni jam ne distingis “姓” kaj “氏”.

La ĉinaj nomoj estiĝis tiele:

1. Preni oficon kiel nomon: Antikve la ŝtataj oficistoj prizorgantaj militajn aferojn, konstruadon, klerigadon, juron kaj personaron estis nomataj respektive Sima (司马), Sikong (司空), Situ (司徒), Sikoŭ (司寇) kaj Siŝi (司士), tial iliaj posteuloj heredis la nomojn.

2. Preni profesion aŭ metion kiel nomon: Faristoj de ceramikaĵoj portis la nomon Taŭ (陶 — ceramikaĵo), staplejaj prizorgantoj portis Cang (仓 — staplejo), komercistoj Ĝja (贾 — komercisto) ktp.

3. Preni klanajn nomojn aŭ nobelajn titolojn de prapatroj kiel nomojn: Ekzemple, reĝo Jaŭ laŭ tradicio portis klanan nomon Tang (唐) kaj parto de liaj posteuloj heredis tiun nomon.

Tiaj ekzemploj estis ankaŭ Ju (虞), Ŝja (夏), Ŝang (商), Jin (殷) kaj Ĝoŭ (周). Kaj krome Ŭang (王) signifas reĝon, Hoŭ (侯) markizon, Gongsun (公孙) filon de princo. Ili ĉiuj portis la nomon de siaj nobelaj titoloj.

4. Preni nomojn de lokoj, regnoj kaj feŭdoj kiel nomojn: Laŭ ĉina legendo la prapatro de la homaro Fuŝji loĝis en oriento, kaj liaj posteuloj portis la nomon Dongfang (东方 — oriento). En Ŝang-dinastio (16-11-a j.c. a.K.) estis malgranda regno Ĵuan, kaj la posteuloj de la regnantoj portis la nomon Ĵuan. En la periodo Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.) la altranguloj de la regno Ĉji loĝis en la antaŭurboj kaj iliaj posteuloj portis nomojn Donggŭo (东郭 — orienta antaŭurbo), Nangŭo (南郭 — suda antaŭurbo), Ŝjigŭo (西郭 — okcidenta antaŭurbo) kaj Bejgŭo (北郭 — norda antaŭurbo). Tiuspecaj nomoj estas ankaŭ Ĉji, Lu, U, Ĉu, Ĉin, Jan, Ĝaŭ, Song, Ŭej, Ĉaj, Ŝjimen ktp.

5. Preni totemojn kiel nomojn: Ekzemple, Ma (马 — ĉevalo), Niŭ (牛 — bovo), Jang (羊 — ŝafo), Long (龙 — draĵo).

6. Preni numeralojn kiel nomojn: U (伍 — kvin), Lu (陆 — ses), Ŭan (万 — dekmil).

7. Iuj du-ideogramaj nomoj estis transliteritaj de tiuj de nacimalplimulto, ekzemple Ĉangsun, Helan, Hujan ktp.

费廉岑薛	鲁韦昌马	戚谢邹喻	朱秦尤许	赵钱孙李	百家姓
雷贺倪汤	苗凤花方	柏水寔章	何吕施张	周吴郑王	
滕殷罗毕	俞任袁柳	云苏潘葛	孔曹严华	冯陈褚卫	
郝邬安常	酆鲍史唐	奚范彭郎	金魏陶姜	蒋沈韩杨	

Paĝo el «Centoj da Familiaj Nomoj»

La supraj metodoj de nomiĝo estis uzitaj ĉefe de hanoj. En Ĉinio estis pli ol 50 nacimalplimulto, kaj la metodoj de ilia nomiĝo estis tre diversaj. La anoj de Ŝe-nacieco en la sud-orienta montaro de Ĉinio ĉefe portas nomojn Pan, Lan, Lej kaj Ĝong. Pri tio estis bela legendo: Prapatro Pan Hu de Ŝe-nacieco edziĝis al filino de regnestro pro lia brava rezisto kontraŭ agreso. Post edziĝo Pan Hu kaj la princino transloĝiĝis en profundan montaron kaj generis tri filojn kaj unu filinon. Li nomis siajn infanojn kaj la bofilon laŭvice Pan, Lan, Lej kaj Ĝong. Iliaj posteuloj formis Ŝe-naciecon. La anoj de Dulong-nacieco loĝantaj en nord-okcidento de la provinco Junnan konservas apartan metodon de nomdono. Ĉiu havas antaŭ sia propra nomo la nomojn de la klano kaj la patro (filino portas ankaŭ nomon de sia patrino). Ekzemple, iu knabino de Dulong-nacieco havas la nomojn Bajli (nomo

de la klano) Dingban (nomo de la patro) Ding (nomo de la patrino) Akĉa (karesnomo) Nan (vico inter gefratoj). La ji-oj en la Granda kaj Malgranda Ljangŝan-montaroj de Siĉŭan-provinco kaj la nu-oj kaj hani-oj en Junnan-provinco portas ankaŭ la nomon de la patro. La Tibetanoj en la Tibeta Aŭtonoma Regiono kaj la provincoj Ĉinghaj, Gansu, Siĉŭan kaj Junnan kutime ne portas familian nomon. Laŭ iliaj nomoj la seksoj povas esti facile distingeblaj. Ordinare la nomoj konsistas el 2 aŭ 4 silaboj elektitaj el budhismaj sutroj. Por eviti miskonon de la samaj nomoj oni aldonas al ili "大" (granda), "小" (malgranda) aŭ iun ideogramon signifantan ties karakterizaĵon. Parto de iliaj nomoj portas antaŭ si la nomojn de naskiĝloko aŭ loĝloko, aŭ la profesion. Nobeloj kaj vivaj budhoj portas antaŭ sia nomo la nomon de sia domo (nomo de ties hereda farmbieno), titolon de oficrango, honoran nomon, kiuj portas neniom da sanga rilato. La ofte uzataj nomoj de Ĝŭang-nacieco de Ĝŭangŝji estas Ŭej, Jang kaj Ĉin. Tiuj de Huj-nacieco estas Baj, Ma kaj Ŝi. Anoj de multaj nacimallimultoj uzas han-lingvajn ideogramojn por siaj nomoj. Ekzemple koreanoj ofte nomas sin Pjaŭ, Ĝin, Cuj, Li k.a. En la feŭdisma socio de Ĉinio la familiaj nomoj markas ne nur sang-rilaton de persono, sed ankaŭ la honoron, rangon, profesion kaj hobi-ojn de ties prapatroj.

Kiom da familiaj nomoj ekzistas en Ĉinio? Libro «Centoj da Familiaj Nomoj» kompilita

en Song-dinastio (960-1279 p.K.) entenis 434 unu-ideogramajn nomojn kaj 60 du-ideogramajn nomojn. «La Ĉinaj Famaj Personoj» kolektis 4 129 familiajn nomojn, el kiuj nur ĉirkaŭ 200 estas ofte uzataj, kaj la plej multe uzataj estas Ĝang, Ŭang, Li, Ĝaŭ kaj Liŭ. Proksimume cent miloj da ĉinoj portas la familian nomon Ĝang. En Tajŭan-provinco estas 737 nomoj, el kiuj granda parto estas malmulte uzataj en la tuta lando. En Fuĝjan-provinco ĉ. kvinono de la loĝantoj portas la nomojn Ĉen kaj Lin. Tie preskaŭ en ĉiu vilaĝo estas unu aŭ du nomoj kiujn portas plejparto de la familioj. Tion kaŭzis probable tio, ke antikve la membroj de la sama klano loĝis koncentriĝe.

Ĝenerale ĉinoj portas familian nomon de la patro, nur malmultaj portas familian nomon de la patrino. En malmultaj lokoj knaboj portas la familian nomon de la patro kaj knabinoj tiun de la patrino.

Ĝenerale persona nomo sekvas familian nomon. La nomoj de antikvuloj estis pli komplikaj ol tiuj de la nuntempuloj. Iliaj nomoj konsistis el kvar partoj: familia nomo, persona nomo, adoltiĝa nomo kaj respekta nomo. La personan nomon donas la patro, la adoltiĝan nomon oni ricevas ĉe adoltiĝo (viro je 20 jaroj kaj virino je 15 jaroj), kiel sian oficialan nomon. La respektan nomon alprenas vaste konataj erudiciuloj por montrisian ideon kaj hobiojn. Ekzemple la granda poeto Lu Joŭ de Song-dinastio (1127-1279 p.K.) alprenis por si


la nomon Fangŭeng, kio signifas en la ĉina lingvo vastanimecon kaj grandan senĝenecon.

Nuntempe oni multe simpligas la nomiĝon. Plejparto de la ĉinoj portas familian nomon kaj personan nomon. Iuj ricevas karesnomon en sia mamsuĉa tempo. Ĝenerale la nomoj spegulas la esceptojn de nomdonantoj. Ekzemple Fu (富 — riĉeco), Guj (贵 — nobleco), Caj (财 — riĉaĵo), Kang, Ĝjan (康, 健 — sano), Song (松 — pino), Ŝou (寿 — longa viveco), Dong (栋 — solivo), Ĝje (杰 — inteligente elstara persono), Ĝjun (俊 — persono tre kompetenta aŭ belaspekta), Caj (才 — talento) ktp. Ĝenerale la nomoj de viroj estas facile distingeblaj de tiuj de virinoj. Por nomi virojn oni ofte uzas ideogramojn signifantajn imponecon kaj bravecon, ekzemple: Feng (峰 — montpinto), Taŭ (涛 — ondego), Ljang (良 — eminenteco), Ŝeng (生 — eleganta junulo), Ji (义 — justamo) ktp. Por nomi virinojn oni multe uzas la ideogramojn signifantajn belecon, ekzemple: Ĝen (珍 — juvelo), Ĉin (琴 — muzikilo), Hŭa (花 — floro), Fen (芬 — bonodoro de floroj), Fang (芳 — bonodoro de floroj), Hŭa (华 — bela brilo), Li (丽 — beleco) ktp. Verkistoj kaj artistoj havas pseŭdonimon. Ekzemple Laŭ Ŝe estis pseŭdonimo de tre fama ĉina verkisto. Lia familia nomo estas Ŝu, la propra — Ĉingĉun, la adoltiĝa — Ŝeju. La eminenta aktoro de pekinopero Mej Lanfang havis la originan nomon Mej Lan. Li alprenis pseŭdonimon Mej Lanfang ĉe sia debuto.





Hu Jaubang, ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, inter novaj kaj malnovaj japanaj amikoj



## Renkontiĝo de ĉinaj kaj japanaj gejunuloj





Gaja dancado



Kuna arbo-plantado por amikeco



Ĉinaj kaj japanaj gejunuloj sur la Granda Muro



En Ĝongnanhaj







Antaŭ pentraĵo farita de ĉina kamparano



Japanaj junulinoj kantas en kunveno.




Respondeculoj kaj laborantoj de CEL kaj EPC kaj junaj japanaj esperantistoj en kunsido

En fruktoĝardeno




Junaj ĉinaj kaj japanaj esperantistoj kunsidas en Hangĝou





Amika aktivado en Ŝanhajo

En la parko Ŝjüan'uhu, Nankino



Adiaŭo





# *Leteroj inter du mondekstremoj*

## *pri Esperantologio*

### **PLENE UTILIGI LA DISPO- NEBLAJN VORTFARAJN MATERIALOJN DE ESPERANTO<sup>1</sup>**

**— EL LETERO DE S-RO  
HERNANI RESENDE**  
(Portugalia)

**M**I ne estas lingvisto, sed instruisto pri historio. Mi legis plezurege la artikolon aperintan en la maja numero de EPĈ.<sup>2</sup> Bonvolu tamen permesi al nefakulo, kia mi, fari kelkajn konsiderojn inspiritajn de la studo.

Pri la strukturo de Esperanto oni multon skribis jam. Lastatempe tamen aperis sugestoplenaj studoj, kiuj ne ĉiam plene akordiĝas inter si. Ili montras do, ke multo estas ankoraŭ esplorenda. Ekzemple S-ro J. Wells defendas, ke morfologie Esperanto estas ideala, preskaŭ centelcente aglutina lingvo, kun izolaj trajtoj. Laŭ hipotezriĉa artikolo de S-ro Cl. Piron la Internacia Lingvo estas, el morfologia vidpunkto, esence izola, kiel la ĉina, kun tre multaj aglutinaj trajtoj. Al nefakulo, kia mi, ĉi tiu lasta tezo eble ŝajnas pli klariga ol la antaŭa, ĉar fakte la memstareco de ĉiu radikoj estas strukture trajto izola. Oni jam delonge rimarkis, ke ĉi izola-aglutinema strukturo (kiel mi nefake diros ĉi tie) de-

venas de apriora skemismo elpensita de Zamenhof, tute kontraŭa al la "naturalismo". Novaj radikoj estas bonvenaj nur tiam, kiam ne eblas formi taŭgajn, simplajn kaj vivoplenajn kunmetaĵojn.

La ofta nenecesa radikprunto bremsas siavice la produktivecon de Esperanto, tio estas, ĝian vortfaradon. Taŭga ekzemplo estas la vorto PROCENTO, kiu anstataŭas la multe pli regulajn kunmetaĵojn elcento aŭ pocento, tuj kompreneblajn de ĉiu esperantisto.

S-ro Fr. Lo Jacomo en LIBERTE OU AUTORITE DANS L' EVOLUTION DE L' ESPERANTO (1981) citas pri tiu fenomeno alian ekzemplon: "Dum la filo faris SIMULTANAN interpretadon en la BUREAU por INTERMINISTERIA KOORDINADO, kie la nova SANITARA REGLAMENTO diskutiĝis, la patron oni veturigis al la MUNICIPAL HOSPITALO, kaj la MEDICINISTO diagnozis INFARKTON de la MIOKARDIO" (paĝo 118). La substrekitaj vortoj estas facile anstataŭeblaj per la esperantaj: SAMTEMPA, OFICEJO, INTERMINISTREJA, KUNORDIGO, PRISANA, REGULARO, MALSANULEJO, KURACISTO, ŜTOPON, KORMUSKOLO. Tiu

stranga fenomeno estas sentebbla ne nur rilate la ĉiutagan vivon, sed ankaŭ la sciencan, kiel cetere la artikolo de Ĝu Ŝjŭeli tre klare reliefigas. Ĉar ĉinaj esperantistoj alprenas la izolan karakteron de la Internacia Lingvo multe pli facile ol eŭropaj kaj amerikaj, ili povas do, per sia amasa skriba produktado kontraŭi la troan nenecesan vortpruntecon. Kune kun aliaj aziaj samideanoj, ili helpu Esperanton iĝi tute memstara lingvo, irante sian propran vojon. Jen do, kial mi legis plezure la artikolon de Ĝu Ŝjŭeli kaj kial preskaŭ ĉiam plezure mi legas la artikolaron de EPĈ.

Evidente mi neniel pretendis, ke mi mem liberiĝis el miaj naciaj lingvokutimoj, sed mi devas agnoski, ke la legado de bonaj literaturaĵoj kaj artikoloj verkitaj de ĉinaj, japanaj kaj aliaj aziaj esperantistoj helpas min konscii tiun fakton.

### **AL KIU LINGVOKATEGORIO APARTENAS ESPE- RANTO?**

**— RESPONDO DE ĜULI<sup>3</sup> AL  
S-RO HERNANI RESENDE**

**S**AME kiel vi, ankaŭ mi estas nefakulo pri lingvistiko. Mi okupiĝas pri redakto kaj traduko. Neniam mi ricevis lingvistikan edukadon, sed nur iom studis ĝin

dum laboro. Via kvinpaĝa longa letero multe lernigis min.

Vi pritraktis ankaŭ la problemon: al kiu kategorio apartenas Esperanto? Nun pli kaj pli multe da homoj interesiĝas pri tio, inkluzive de mi mem. Morfologie, lingvoj en la mondo klasifikigis en la fleksia, la aglutina kaj la izola. Tradicie dirite, Esperanto estas aglutina lingvo. Sed en la lastaj jaroj aperis kelkaj verkoj, kiuj kontraŭis la tradicion. Krome la verkintoj argumentis ankaŭ ne akorde inter si, ĝuste kiel vi resumis en via letero.

Laŭ mia laika kompreno, Esperanto estas etimologie eŭroptipa. Tial, en sia libro "Teorio de Esperanto" soveta esperantologo V. Varankin nomis ĝin "nova hindo-eŭropa lingvo". Lingvoj uzataj eŭrope estas plejparte fleksiaj, kiuj forte influas Esperanton en sintakso kaj fraztipo. Sed en vortfarado Esperanto havas karakterojn de la aglutina kaj la izola, kaj la lasta montriĝas ŝajne pli reliefe. La aglutinaj kaj la izolaj ĉefe uziĝas en la Oriento, kaj inter ili la ĉina estas konata kiel tipo de la izola lingvo.

Do, la fleksia, la aglutina kaj la izola. Al kiu apartenas Esperanto? Alivorte, ni prunteprenis la diron de S-ro Claude Piron: "Esperanto — ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?"

Kiam oni diskutas pri iu problemo, li eble hazarde demandas al si mem: ĉu ĝi vere indas je senfina diskutado? Kaj ĝuste mi nun tiel pensas: ĉu nepre necesas fari klasifikon por Esperanto?

Miaopinie, la konceptoj de la fleksia, la aglutina kaj la izola ne estas idealaj por klasifiko. Ĉar:

Unue, la distingo inter tiuj tri kategorioj ne estas tre klaraj. Fakte en nia mondo neniu lingvo

tute konformas al iu ajn el la tri lingvokategorioj.

Kaj due, ili ne povas enteni ĉiujn lingvojn en la mondo. Kaj, por listigi kaj priskribi diversajn lingvojn en la mondo, oni preferas genealogion al morfologio en multaj lingvistikaj libroj. Eĉ en tipologio la klasifiko de la nomitaj tri estas ne kompleta.<sup>4</sup>

Ankaŭ la vortaranĝo de "eŭropa lingvo" aŭ "azia lingvo" estas nescienca. En Azio, la persa, la afgana, la bengala, la sinhala k. a. estas parencaj al la plej multaj lingvoj uzataj de eŭropanoj tiel en deveno kiel en strukturo. En Eŭropo, kvankam grandparto el tieaj lingvoj apartenas al la fleksia, sed troviĝas ankoraŭ la finna, la estona kaj la hungara, kiuj estas tamen nehindoeŭropaj. Se iu asertus ke "eŭropaj lingvoj" estas senescepte fleksiaj hindoeŭropaj lingvoj, la anoj el Finnlando, Estonio kaj Hungario eble protestus kontraŭ tio. Tian komplikan cirkonstancon S-ro Claude Piron jam klare montris en la unua paragrafo de sia verko.

Esperanto estas ne fleksia nek aglutina nek izola. Esperanto estas nur Esperanto. La karakteroj de la tri — ĉiuj troviĝas en nia lingvo, kaj tiel rezultigas malfacilon por ĝin klasifiki. Aŭ, ĉu mi povus diri, ke la Internacia Lingvo havas iujn avantaĝojn de ĉiuj ĉefaj lingvoj en la Okcidento kaj la Oriento, forĵetinte iliajn nelogikaĵojn kaj neraciaĵojn.

Laŭ han-lingva fonetika alfabeto, Esperanto estas *Shijieyu*. *Shijie* = la mondo, *yu* = lingvo, do *shijieyu* = monda lingvo) Ĝin oni prunteprenis el Japanio laŭ ideografiaĵoj antaŭ kelkdek jaroj, ĝis nun ĝi estas jam agnoskita de la tuta ĉina esperantistaro. Kompreneble ĝia signifo estas ne preciza, ĉar nia lingvo celas nur in-

ternacie helpa sed ne monde komuna. Sed, temante pri klasifiko, tiu nomo tamen estas taŭga eventuale. Esperanto estas eŭropa kaj ankaŭ azia. Sed ĝi estas ne nur eŭropa kaj same ne nur azia. Ĝi estas tutmonda. Ĝi estas nia — kaj de eŭropanoj kaj azianoj, kaj ankaŭ de aliaj kontinentanoj.

Do, vere neŭtralas Esperanto, kiu neniam petis protekton de iu ajn etna lingvo. Kaj vere tutmondiĝas Esperanto, ĉar ĝi havas samaĵojn aŭ similaĵojn en diversaj aspektoj kun ĉiuj ĉefaj lingvoj en la Okcidento kaj la Oriento, inkluzive de la ĉina lingvo.

1. *Prenate kiel titolo, tiu frazo estas citita el la letero de Resende al Ĝu Ŝjueli.*
2. *La menciita artikolo estas verkita de Ĝu Ŝjueli.*
3. *Por faciligi prononcon, same por tion fari de mi mem, mi mallongigis mian nomon al "Ĝuli", kiun mi volas preni kiel mian pseŭdonimon. — noto de la verkinto*
4. *Krom la fleksia, la aglutina kaj la izola kiel tri ĉefaj, aldoniĝis ankaŭ la tiel nomata "polisinteza" en klasifiko.*

## MONATO

internacia magazino sendependa

### UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj  
esperanto-revuoj

Inform-riĉa, bele ilustrita.

Petu inform-materialon de:

MONATO, Frankrijklei 140  
B-2000 Antwerpen, Belgio.



# Neniam forgesebla rakonto

de ĜANG ĜANG

**S**UN Ĝingŝiŭ estas tre fama pedagogo de Ĉinio. Kiam li estis 12-jara, li loĝis ĉe sia onklo. Foje en la korton enflugis granda flava kokino de najbaro, kaj lia onklino kaptis ĝin. Poste ŝi kaŝis ĝin en korbon kaj kovris per tuko. Instigate de sia onklino, Ĝingŝiŭ vendis la kokinon.

Kiam li revenis de bazaro, la onklino montris maloftan ĝojon. Ŝi enmanigis al li du monerojn: “Mia kara, jen al vi por aĉeti bombonojn.”

Li malofte ricevis monon. Ĉi-foje li ne foruzis la monerojn kaj decidis doni al sia patrino por ke ŝi aĉetu bombonojn por lia fratineto. Sed, kiam li montris kun granda ĝojo la monon al la patrino, la patrino perdis la kutiman ridetan mienon kaj demandis lin: “De kie vi akiris la monon?”

Li rakontis al sia patrino la aferon. La patrino diris al li: “Iru redoni la monon al la onklino kaj diru al ŝi, ke via patrino ne permesas al vi havi poŝmonon.”

Li sentis malagrablon: Estis malofte por li ricevi monon, kaj kial rifuzi? Tamen li redonis la monon, ĉar li ĉiam obeis sian patrinon.

La patrino rimarkis lian malĝojon. Kiam li enlitiĝis en nokto, la patrino rakontis al li karesante lian kapon:

Iam estis knabo Ŭang Ŝjaŭ-er. Li ŝtelis de sia najbaro kokon kaj formanĝis ĝin kune kun la supo. Sed, kiam li enlitiĝis, li sentis malkomfortecon kaj ekgratis al si la korpon. Ho ve, li trovis ke plumoj elkreskis sur sia korpo. Poste li

trovis kokoplumojn ankaŭ sur siaj vangoj, manoj, piedoj kaj ĉie sur la korpo. Li esplorigis de teruro, ke li fariĝis monstro. “Kia honto estos, ke oni vidos min en plumoj!” Ĝuste kiam li sidis en granda ĉagreno, eniris avo kun griza barbo, vestita en flava robo. Li demandis Ŭang: “Ĉu vi scias, kial sur via korpo elkreskis kokoplumoj? Ĉu vi ŝtelis kokon de via najbaro? Se vi volas ankoraŭ la honoron, vi iru al la najbaro kaj konfesu la kulpon. Petu lin bati kaj riproĉi vin, kaj tiele malaperos la kokoplumoj.” Je la diro malaperis la avo.

Ho ve, peti baton de aliulo, kia honto! Sed, se ne tiel, pli granda honto lin trafos morgaŭ matene, kiam la najbaroj vidos lin en kokoplumoj.

Kiam li frapis je la pordo de la najbaro, jam estis noktomezo. La najbaro, tre afabla avo, miris: “Kio grava okazas? Ĉu vi venus morgaŭ matene, se la afero ne brulas?”

“Ne, ne, vi nepre malfermu al mi la pordon!”

La avo malfermis la pordon kaj eksaltis de teruro: “Ho, kiu vi estas?”

“Mi ja estas Ŝjaŭ-er. Mi ŝtelis vian kokon kaj nun mi petas vian baton.”

“Sed vi jam pentis pri via kulpo, kaj kial ankoraŭ bati vin? Revenu hejmen kun trankvilo.”

“Ne, sen via bato la kokoplumoj ne malaperos.” Tion dirinte li genuiĝis antaŭ la avo.

La avo frapis al li la vangon kontraŭvole kaj riproĉis lin: “Vi senhonta bubaĉo!”

De tiam Ŝjaŭ-er fariĝis bona knabo.

Post rakontado la patrino demandis Ĝingŝiŭ: “Via onklino vendis alies kokon, kaj vi volas aĉeti bombonojn por via fratineto per tiu mono, ĉu vi dezirus, ke ankaŭ via fratineto ekhavu sur sia korpo kokoplumojn? Memoru, ne akceptu monon kiun vi ne rajtas akcepti, kaj ne manĝu, kion vi ne devas manĝi.”

Sun Ĝingŝiŭ aŭskultis de sia patrino sennombrajn rakontojn, kaj multajn el tiuj li jam forgesis. Sed la rakonton pri Ŭang Ŝjaŭ-er li memoris neforviŝeble. Li multfoje diris al aliaj, ke la rakonto de la patrino influis lin dum lia tuta vivo. Li senĉese ripetadas la rakonton al multaj infanoj.



XIAO LI

## Por distribui Esperantajn eldonaĵojn

*Depost la instalo de la rubriko "Niaj perantoj" ni ricevis plurajn kontribuojn kaj leterojn de niaj perantoj. El ili ni jam publikigis sep leterojn en nia revuo. Pro manko de spaco ni ne povas publikigi ĉiujn iliajn leterojn. En 1985 ni malfermos novajn rubrikojn, tial en ĉi numero ni povas nur koncize konigi ilin ĉiujn kune kun la alsenditaj fotoj. Ĉe la jarfino ni esprimas niajn korajn bondezirojn al ĉiuj niaj perantoj, kiuj laboras por disvastigi nian lingvon.*

— LA RED.

Informiĝinte, ke la revuo EPĈ konigos al la legantoj siajn perantojn, nia belga peranto eldonejo kaj librejo Sonorilo tuj sendis al ni leteron, en kiu ili rakontis sian historion. Antaŭ 1962 ekzistis du oficialaj Esperanto-librejoj en Belgio. En 1960 ili kune prizorgis la libroservon dum la 45-a Universala Kongreso en Bruselo. Oni decidis finfine por havi nur unu novan librejon. Ekde 05.07.62 la eldonejo kaj librejo Sonorilo ekzistas en Bruselo, kaj de tiam faras aktivajn kontribuojn al la Esp-movado. Ekde sia fondiĝo, ĝi ĉiam provis havi la malplej altajn sendokostojn kaj vendoprezojn. Ĝia adreso: Doornstraat 22, B-2160 WILRIJK-ANTVERPEN en BELGIO. Ĝi ĉiam bonvenigas la vizitantojn.

Nia sveda peranto estas Esperanto-skolan, Barnhu sqatan 8, 111 23 STOKHOLM, SVEDIO, t.e. la adreso de la libroservo de la Sveda Laborista Esperanto-Asocio. Ĝi peras kaj ekspedas mendojn de E-libroj kaj E-gazetoj. EPĈ kaj aliaj ĉinaj eldona-

ĵoj estas evidente pridemanditaj. Se ĝi ne havas la menditan libron en stoko, ĝi havigos ĝin al la kliento. Nova eldono estas projektita antaŭ 1984 kaj estonte ĉiujare. La SLEA-anoj tre ĝojas kiam ili en EPĈ legas pri la nuntempa intereso en Ĉinio pri Esperanto. Ili deziras al la ĉinaj esperantistoj prosperan Esperanto-jaron dum 1984.

Ankaŭ la Luksemburga Esperanto-Asocio, nia peranto de tiu lando, esprimis la saman bondeziron al ni. Ĝi diris al ni, ke plej bone vendiĝas la ilustritaj infanlibroj eldonitaj de Ĉinio.


En siaj leteroj la perantoj ne nur konigis pri sia laboro, sed ankaŭ pri sia amata ĉevaleto kaj postlabora vivo. Nia jugoslava peranto s-ro Kocian Aleksandar diris al ni: "Mi estas delegito de UEA en Osijek kaj sekretario de Esperanto-societo 'Liberiga Stelo,'" "Miaj hobiaĵoj estas ĝardenismo," "Mi estas ankaŭ kolektanto de insignoj" kaj "interesiĝas pri lingvoj," "Mi kune kun alia preparis Esperanto-Kroatan Vortaron". Li diris ankaŭ, ke li

kutimas disdoni EPĈ inter siaj gekursanoj. La gazeto al ĉiuj tre plaĉas. Li bonvenigas vizitantojn-abonantojn. Lia telefonnumero estas 054/21/231. Alia jugoslava peranto s-ro Tomo Plaĉkovic diris, ke li kiel altklasa elektromuntisto havas monatsalajron kaj lia vivokondiĉo absolute ne dependas de iu ajn lia hobiaĵo — kaj des malpli de Esperanto. Li ofte regalias iujn "abonantojn", kiuj, laŭ lia opinio, devas scii pri EPĈ.

La aŭstra peranto estas s-ro Leopold Patek, kiun ni konigis en nia revuo, n-ro 8, 1982, kaj ĉifoje li sendis al ni foton por esprimi sian subtenon al nia laboro. S-ro Albert Wickler, respondeculo de la Luksemburga Esperanto-Asocio, diris en sia letero, ke al li tre plaĉas la ĉina drog-herbo kaj ĉina ŝako, kaj ke li deziras legi tiajn artikolojn en la revuo kaj iutage persone ludi kun ĉinoj. Ankaŭ alia jugoslava peranto s-ro Petar Krstic kompilis "Rimoj por Literoj" kaj sendis ĝin al nia redakcio. Tiuj niaj perantoj konigis al ni multe pri sia streĉa, gaja kaj signifoplena



*S-ro Leopold Patek*



*S-ro Kocian Aleksandar*



*S-ro Petar Krstić*

*S-ro Albert Wickler*



vivo. Karaj legantoj, se vi volas konatiĝi kun ili, vi povus sendi leterojn al ALBERT WICKLER, LETZEBUERGESCH ESPERANTO-ASSOCIATION. KOCIAN ALEKSANDAR, OSIJEK, BADICEVA II, JUGOSLAVIO. PETAR KRSTIC, EME-

RITO SVETOZAREVO, GOSINA 5/I JUGOSLAVIO.

Komprenoble ne ekzistas rozoj sen dornoj. Nia jugoslava peranto s-ro Kaplan Martin tiel skribis en sia letero pri la malfacilaĵoj en la Esp-movado, sed ni kredas ke la Esp-movado eniras en novan printempon, pli kaj pli da novaj samideanoj staros en nia vico. Por konatigi sin kun s-ro K. Martin, fervoraj esperantistoj povas veturi al Galjevlca 14 61000-Ljubljana, Jugoslavio.

*S-ro Kaplan Martin*



## **Ivan Bratoš Forpasis**

La 16-an de aŭgusto 1984 forpasis s-ano Ivan Bratoš,

unu el la jugoslavaj perantoj de EPC, en sia 88-jaraĝo. Rezulte de lia aktiva kunlaboro EPC sukcesis havigi multe da abonantoj el Jugoslavio. Li ankaŭ sindoneme klopodis por E-movado en sia lando dum dekoj da jaroj.

Ni esprimas plej korajn kondolencojn, kaj li restos ĉiam en nia memoro.

## **KOREKTOJ EN LA 10-A N-RO**

1. Anstataŭ la dua frazo de la unua alineo, p. 3, legu "Dank' al la 35-jara konstruado la malriĉa kaj postiĝinta Ĉinio fariĝis unuapapŝe prospera kaj potenca socialisma lando."

2. Anstataŭ "1964", 11-a linio, dekstra kolumno, p. 7, legu "1970".

3. Anstataŭ "(la unua de dekstre)" en la bild-klarigo, p. 43, legu "(la unua de maldekstre)".

# TUJ ABONU EPĈ:

## JAM KOMENCIĜIS ABONVARBA KAMPANJO POR 1985

Ekde 1-a nov. 1984 ĝis 28-a feb. 1985

Tiu, kiu abonos aŭ reabonos dum tiu periodo, senpage ricevos Esperantajn koloran kalendaron por 1985 kaj mapon de la Ĉina Popola Respubliko.

### ABONTARIFO

lando	valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	\$A	9.00	15.00	21.00
Britio	£	5.00	8.50	12.00
Francio	FF	60.00	100.00	144.00
FR Germanio	DM	18.00	30.00	42.00
Hispanio	Pts	900.00	1 500.00	2 100.00
Italio	Lit	11 000.00	18 700.00	26 400.00
Japanio	Yen	2 000.00	3 500.00	5 000.00
Jugoslavio	Din.	300.00	500.00	700.00
Nederlando	Gld.	22.00	37.00	52.00
Portugaliao	Esc.	700.00	1 190.00	1 680.00
Usono	US\$	10.00	17.00	24.00
Kanado	Can\$	10.00	17.00	24.00

Por aliaj landoj en Eŭropo:

£	5.00	8.50	12.00
US\$	8.00	13.00	18.00

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

£	2.80	4.50	6.50
US\$	4.00	6.50	9.00

Kore bonvenigata estos ĉiu, kiu volonte varbos abonantojn por EPĈ. Ĉin-stila memoraĵo iros al ĉiu abonvarbanto proporcie al la nombroj de ties varbiloj.

La varbanto sendu abonant-liston kaj abon-pagojn al la loka peranto aŭ sendu la liston kaj pagojn rekte al la suba adreso:

Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHU-DIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

*Prospekton kaj prou-ekzempleron oni sendos senpage laŭ peto.*




## FAMAJ ĈINAJ SCIENCISTOJ POR ESPERANTO

**P**OST kiam fondiĝis la Sciencista kaj Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj la 15-an de junio, 1984, en la komenco de septembro famaj sciencistoj prezentis proponon al gvidantoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj, ke ili subtenu laboron de la asocio, propagandu kaj disvastigu Esperanton en la sciencista rondo.

La propono estis subskribita de matematikisto Sun Keding, paleontologo Ĝou Mingĝen, geologoj Liŭ Dongŝeng kaj Sun Juke, meĥanikisto Tan Haŭŝeng, akustikisto Ŭang Denĝaŭ, biologo Bej Ŝiĝang, meteorologo Ĝu Gangkun, geografo Hŭang Bingĝej, gekemiistoj Ĝjang Liĝin, Ŝju Gŭangŝjan, Gaŭ Ŝjaŭŝja kaj Hŭang Ljang.

La propono emfazas: "Nun aŭdiĝas komuna voĉo en kaj eksterlande, t.e., konduki Esperanton en la sciencan kaj teknikan kampon. Ni opinias tion bona afero, kiu konvenas al la konstruado por la kvar modernigoj de nia lando. Se ni prenos Esperanton, lingvon tre facile lerneblan, kiel ilon por interŝanĝi sciencojn kaj teknikojn, sendube tio multege akcelos la sciencan kaj teknikan interŝanĝon inter Ĉinio kaj aliaj landoj kaj utilos al la modernigo de nia lando. Estante ĉinaj sciencis-



S-ro Lu Ĝjaŝji

toj, ni havas devon realigi tiun esperon kiel eble plej rapide."

La proponon subtenas Lu Ĝjaŝji, prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Li konsentis esti la honora prezidanto de la Sciencista kaj Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj.

## ESPERANTAJ LIBROJ NOVE ELDONITAJ

Antaŭ nelonge en Ĉinio la Hŭangŝi-a, Ĉongĉing-a kaj Junnana Esperanto-Asocioj, la Perfektiga Esperanto-Kurso de la Hefeja Fremdlingva Kolegio eldonis jenajn Esperantajn librojn: "Artikoloj Dediĉe al S-ano Tikos", "Detala Klarigo pri Esperanta Gramatiko", "Mezgrada Lernolibro de Esperanto", "900 Frazoj de Esperanto", "Lernolibro de Esperanto" (dua parto), "Esprimo de Sentoj en Esperanto", "La Tuta Esperanto", "Gramatikaj Punktoj de Esperanto", "Lernolibro por Esperanto-Kursoj", "Unua Ŝtupo — Lernolibro de Esperanto", "Kurso de Esperanto" kaj "Antologio de Esperanto".

## LA ĜANGĜJANG-A ESPERANTO-ASOCIO FONDITA

En la 20-a de aŭgusto okazis la fondokunveno de la Ĝangĝjang-a Esperanto-Asocio en la havenurbo Ĝangĝjang en la suda parto de Gŭangdong. La kunvenon ĉeestis pli ol 400 Esperantaj amantoj. Ili elektis Hŭang Jibjaŭ, vicprezidanton de la Konstanta Komitato de la Urba Popola Kongreso, kiel ĝian honoran prezidanton, Ŝing Ŝuĉin, vicedron de la propaganda departemento de la urba partia komitato, kiel ĝian prezidanton kaj Ĉen Jangĉjŭan kiel ĝian konsilanton.

## LA 70-A UK KAJ CETERAJ ARANGĜOJ

La 70-a Universala Kongreso de Esperanto okazos, de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto, 1985 en Aŭgsburgo (Federacia Respubliko Ger-

manio). Kadre de tiu ĉi UK okazos la 38-a sesio de Internacia Kongresa Universitato. Antaŭ la Kongreso okazos la 41-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Eringerfeld (FRG) de la 22-a ĝis la 29-a de julio. Ĝiaj aliĝintoj malpli-ol-26-jaraj je 85 01/01 rajtas aliĝi senpage al la 70-a UK. Dum IJK oni diskutos specifajn problemojn de la junularo en la moderna industria socio. Tuj antaŭ UK (27 julio — 2 aŭgusto) eblos partopreni la internacian kongreson de blindaj esperantistoj en la hotelo Alpenhof, Aŭgsburgo. Post UK la urbo Kronach, kiu situas en norda Bavario, aranĝos postkongresan feriosemajnon de la 11-a ĝis la 18-a de aŭgusto.

La 28-a Internacia Seminario okazos de la 27-a de decembro 1984 ĝis la 3-a de januaro 1985 en Wetzlar, FR Germanio. Ĝin povos partopreni ne nur junuloj sed ankaŭ mezaĝuloj. La temo estas JAPANIO. La Seminario diskutos pri ĝiaj kulturo, historio, ekonomio, literaturo kc.

## ALVOKO AL KOMUNA LIBRO

Por ke homoj el la plej diversaj kontinentoj, landoj, kulturoj, el malsamaj situacioj, havantaj plej diferencajn religiojn, ideologiojn kaj idearojn, esprimu siajn proprajn pensojn kaj sentojn, la Esperanto-Centro Paderborn (FRG) eldonos libron titolitan "Antaŭ la Nova Jarmilo — Ideoj por la vivo el mondo minacata" okaze de la Jubilea Jaro 1987. Ĉiu kontribuanto elektu la formon laŭplaĉe: eseoj, poemo, rakonto, satiro, sciencfikcio, programo ktp kaj sendu sian tekston kun amplekso de malpli ol 20 paĝoj (DIN A4 aŭ similformata paperfolio) antaŭ la 30-a de sept. 1984. Mallonga priskribo de la aŭtoro estu aldonita.

Respondecaj pri la kompilado: D-ro W. Gunther, Friedrich Ebert-Str. 149, D-3500 Kassel, kaj Helmut Welgar, Bismarckstr 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

# Vizito al la naskiĝloko de Konfuceo

**L**A 22-a de septembro de la kuranta jaro estis la 2535-a datreveno de la naskiĝo de la fama ĉina pensulo kaj edukisto Konfuceo. Mi feliĉe ĉeestis la inaŭguran ceremonion por restarigi la statuon de Konfuceo kaj la unuafojan aktivadon de "Vizito al la Naskiĝloko de Konfuceo" en Ĉjufu-gubernio de Ŝandong-provinco.

Je la sesa matene sonorilo en turo ekster la Templo de Konfuceo sonis sesfoje, kio signifis baldaŭan komenciĝon de la aktivado. Kvankam la inaŭgura ceremonio komencis je la naŭa, tamen ĝojaj lokanoj kaj gastoj el aliaj provincoj kaj landoj delonge kolektiĝis antaŭ la halo Daĉeng

de la Templo de Konfuceo kaj atendis por pli frue vidi ĝin.

Je la naŭa guberniestro Ŝju faris la inaŭguron de la statuo de Konfuceo, kaj la kvin pordegoj de la halo malfermiĝis samtempe. Mi iris en la halon kune kun la homa fluo. La halo estis hele prilumita kaj pompe ornamita. Ambaŭflanke de niĉo delikate skulptita staras du dikaj kolonoj kun flugantaj drakoj reliefe kaj aĵure skulptitaj. En la solema atmosfero guberniestro Ŝju malrapide tiris flanken la kurtenon antaŭ la niĉo, en kiu sidas la statuo de Konfuceo 3.3 metrojn alta, kun la brilantaj okuloj direktataj antaŭen, kvazaŭ li donus prelegon al siaj disĉiploj.

Ambaŭflanke de ĝi staras po ok statuoj de liaj disĉiploj, trankvilaj kaj atente aŭskultantaj instruadon de Konfuceo.

Konfuceo vivis en la lastaj jaroj de la periodo Printempo kaj Aŭtuno (770—476 a. K.), kiam la ĉina socio troviĝis en la komplika periodo de transiro de la sklavposeda sistemo al la feŭda. Konfuceo, erudicia kaj akrevida, resumis la historian sperton de la dinastioj Ŝja, Ŝang kaj Ĝoŭ (2140—256 a. K.) kaj esploris diversajn problemojn de la tiama socio. Limigita de klaso kaj epoko, li tamen epitomigis la antaŭan kulturon kaj kreis konfuceanisman. Konfuceanismo enhavas saĝecon kaj kreivon de la ĉina nacio. Post pli ol du mil jaroj iuj principoj el lia doktrino restas ankoraŭ kriterioj en la moralo, kutimoj kaj moroj de la ĉina nacio. Per ili Ĉinio diferencas de Eŭropo en la socia kaj hejma vivo. Krome la ideologio de Konfuceo certgrade influis la orientajn landojn, eĉ eŭropajn kaj amerikajn landojn kaj okupas gravan lokon en la monda civilizacio.

Sed la taksado pri Konfuceo estis senĉese argumentata dum la pasintaj pli ol du mil jaroj. En la dekjara tumultado kaŭzita de la kultura revolucio eĉ iris politika movado por kritiki Konfuceon kaj lian konfuceanisman. Oni detruis ne nur la statuon de Konfuceo kaj rarajn antikvajn

*Baldaŭ inaŭguriĝos la statuo de Konfuceo.*





objektojn en la Templo de Konfuceo, la Domo de Konfuceo kaj la Tombejo de Kong-familio, sed eĉ persekutis personojn, kiuj proparolis por Konfuceo. Nun ĉio ĉi tio jam forpasis. Hodiaŭ Ĉinio klopodas por jesigi la pozitivajn elementojn de la ideologio de Konfuceo, kiel popoleco kaj demokratio, kaj forigi ĝiajn feŭdismajn konservativajn kaj aliajn negativajn elementojn, dank' al la historiaj materiismaj vidpunktoj. Konfuceo estis nek dio, nek demono, sed granda edukisto, pensulo kaj politikisto antaŭ du mil kvincent jaroj. Ĝuste pro tio, la inaŭgura ceremonio vekis grandan intereson de la vastaj popolamasoj kaj allogis al si dekmilojn da vizitantoj de diversaj lokoj de la lando.

Ĝuste en tiu tago, en la gubernia urbo Ĉjufu okazis simpozio pri Konfuceo, en kiu partoprenis pli ol cent specialistoj pri konfuceanismo. La ĉeestantoj interŝanĝis opiniojn pri la karaktero de la epoko, en kiu Konfuceo vivis, la politika tendenco, humanismo kaj mondkoncepto de Konfuceo.

Posttagmeze de la tago ni vizitis la Konfucean Arbaron, kie estas tombejo de Konfuceo kaj liaj posteuloj. La tombejo havas areon de 200 hektaroj kun ĉirkaŭmuro de sep kilometroj. En la tombejo kreskas multaj maljunaj arboj, inter kiuj troviĝas sen nombraj tomboj, tombŝtonoj kaj ŝtonaj skulptaĵoj. Ĝi estas la plej bone konservata kaj plej longdaŭra familia tombejo en Ĉinio. Neniu scias, kiom da Kong-familianoj estis enterigitaj tie dum la pli ol du mil kvarcent jaroj.

Lastatempe, en la arbaro aperis imitaĵoj de antikvaj ĉaroj de la periodo Printempo kaj Aŭtuno por amuzi turistojn. Ankaŭ mi distris min per ĉaro. Balanciĝan-



*S-ino Kong Demaŭ ĉe la ceremonio*

te en la ĉaro kaj aŭskultante trotadon de la ĉevalo kaj tintadon, mi nature imagis al mi pri la tiam Konfuceo. Ĝuste per tiaspeca ĉaro li faris veturadon al najbaraj regnoj, kun siaj ŝatataj disĉiploj, por doni prelegon kaj predikadon pri siaj vidpunktoj.

Vespere, ni gustumis frandaĵojn en "Bankedo en la Domo de Konfuceo". Konfuceo estis frandema, tamen li ne povus imagi al si, kiel grandskala estas la "Bankedo en a Domo de Konfuceo". Tia luksa bankedo estis nomata "Bankedo Manhan", kiu estis farita laŭ la manĉura kaj hana stilo kaj servis speciale al imperiestroj kaj iliaj komisiitoj. Tiu bankedo estas provizita per 404 diversaj manĝiloj kaj 196 pladoj.

La Domo de Konfuceo estas la loĝejo kie vivis la plej aĝaj filoj kaj nepoj de Kong-familio. Ĝi estis tipa bieno de feŭda nobelo. La bankedo okazis en la luksa bankeda halo en la okcidenta parto de la posta korto. Sur la tri pordoj de la bankedhalo pendis kurtenoj kun tri ideogramoj respektive signifantaj: "Feliĉo", "Altrangeco" kaj "Longviveco".

Ni eniris en la bankedhalon en la akompano de muziko kaj petardado. La halo estis ornamita per koloraj lanternoj, en la mezo de muro estis granda ruĝa ideogramo "duobla feliĉo", kaj ambaŭflanke de ĝi versparo, laŭdanta Kong-familion. La bankedo el 36 pladoj estis karakterizita per sia origina bongusteco, kvankam ne tiel abunda kiel "Bankedo Manhan". Nun la "Bankedo en la Domo de Konfuceo" jam servas al turistoj en- kaj eksterlandaj.

Elirinte el la bankedhalo, ni venis al la granda halo, kie la instruistoj kaj studentoj de la Ĉjufua Instruista Instituto ludis antikvajn muzikaĵojn. En la pasinteco, ĉiun printempon kaj ĉiun aŭtunon okazis tie oferado al Konfuceo kaj ludo de antikva muziko. Iuj el la prezentataj programeroj estis adaptitaj ofermuzikpecoj. La muzikistoj kaj dancistoj en antikva oferceremonia uniformo aspektis tre imponaj en la scenejaj lumoj. Tiam gvidisto laŭte ekkantis en akompano de ĉinaj muzikiloj. La kanto konsistas el ses movimentoj, kies enhavo ĉefe laŭdas la meritojn de Konfuceo. Ĝia malrapida

ritmo plene esprimas la profundan estimon kaj karmemoron al Konfuceo.

Inter la ĉeestantoj troviĝis s-ino Kong Demaŭ, fratino de Kong Deĉeng, la pranepo de la 77-a generacio de Konfuceo, kaj liaj aliaj parencoj. Krome la inaŭguron ĉeestis ankaŭ gastoj el Usono, Britujo, Japanio, Francio, Ĉeĥoslovakio kaj aliaj landoj. La urbo Ĉjufu estas fama pro siaj multaj kulturaj vidindaĵoj, kiaj la Templo de Konfuceo, la Domo de Konfuceo kaj la Konfucea Arbaro. Ĉjufu decidis okazigi ĉiujare tian turisman aktivadon kaj varme bonvenigos en- kaj eksterlandajn vizitantojn al si, por ke ili ĝuu la vidindejojn kaj faru kulturan interŝanĝon.



*Plezurĉaro en la arbaro de Konfuceo*



## ELDONITA DE LA ĈINA ESPERANTO- ELDONEJO NOVA KOLORA INFANLIBRO

Ĝi konigas al la legantoj malsamajn nestojn de diversaj birdoj.

Formato: 182.×204 mm. 40 pĝ.

Prezo: £0,95 US\$ 2,00

Numero: 88-Es-203P

**MENDU ĈE: LIBROSERVO DE UEA  
PERANTO DE EPĈ**


**AŬ LA INTERNACIA LIBRO-KOMERCA KOMPANIO DE  
ĈINIO (GUOJI SHUDIAN): ESPERANTA SEKCIO  
P.O. KESTO 313, BEIJING, ĈINIO**




# Mirindaĵoj de Karsta Kaverno en Gujĝoŭ-provinco


Fotoj de ĜIN DEMING

Meduzo (Stalagmito)



Subteraj Pagodoj (Stalagmitoj)






Edena Bankedo (Stalagmitoj)






Kvietaj Montoj (Stalagmitoj)



(Supre-dekstre) Lakta Vojo (Falakvo)



Refaldita Ŝtono

FOTOJ FARITAJ  
DE E-ISTOJ

La Kliniĝanta Turo de Pisa, Italio  
de **PAOLO CERRETINI** (Italio)



Luma somera nokto en Finnlando  
de **LAURI HÄKLI** (Finnlando)





# Ĉarma pejzaĝo de karstaj kavernoj de Gujĝoŭ

de ĈAJ FANG

**K**IAM vi legas ĉi tiun numeron, belaj koloraj bildpaĝoj kondukas vin en la ĉarman kavernan mondon.

Je mencio de karstaj kavernoj la eksterlandaj turistoj, kiuj iam vizitis Ĉinion, eble tuj ekmemoraras la famajn kavernojn Ĉiŝing kaj Ludi. Nun antaŭ ni brilas alia karsta kaverno en Gujĝoŭ-provinco, kiu dormis milionojn da jaroj kaj vekigis antaŭ nelonge.

La provinco situas en sudokcidenta Ĉinio. Tie abunde dissemiĝas karstaj rokoj. Ĝia surtere videbla parto konsistigas pli ol 70% de la totala areo de la provinco kaj kvaronon de la subtropika karsta areo de la mondo. La kaverno havas originalajn, groteskajn kaj belajn pejzaĝojn kun diversaj formoj. El la pli ol 600 malkovritaj kavernoj, la koncernaj departementoj elektis ses kiel scienc-esplorajn kaj turismajn lokojn konstruotajn en la proksima estonteco.


La kaverno "Ĉiela Palaco" sin trovas 23 km. nordoriente de la gubernio Ĝiĝin. Ĝiaj areoj kaj pejzaĝoj multe superas tiujn de la kavernoj Ĉiŝing kaj Ludi. Ĝi estas vasta kaj profunda. En ĝia malfermota parto estas 47 branĉaj kavernoj kun areo de pli ol 300 000 kvadrataj metroj. Ĝia plej alta parto altas 150 metrojn kaj la maksimume larĝa loko larĝas 175 metrojn. Tie arbore staras stalagmitoj kaj trembrilas subteraj lagoj. El la pli-ol-40-for-

maj stalagmitoj videblas konusaj montpintoj pli ol 60 metrojn altaj, la plafon-skrapanta "Reĝa Kasko" kaj kvazaŭ delikate gravuritaj kolonoj, sed la plej menciinda estas krispa stalaktito kun tre maldika kaj travidebla tubo kun akvo interne. Ĝi, kvazaŭ libera de la globa gravito, kreskas kurbiĝante kaj mem evitante ĉiajn obstaklojn. Ĝi vere estas rara mirindaĵo en la naturo. Ĝi

formiĝis ne laŭ la teorio pri la stalaktita naskiĝo, kio vekis interon kaj atenton de tiuflankaj sciencistoj.

Krome, ankaŭ la Drakoreĝa Palaco de Anŝun, la Naŭdraka Kaverno de Tongĵen, la Ĉielstela Kaverno ĉe Hŭangĝoŝu-akvofalo kaj la gipsa kaverno ĉe Ĉinglong, ĉiuj forte allogas la vizitantojn per sia ĉarmeco.

*Mirakla stalagmito*



# Ĉinio savas grandajn pandojn

**E**N majo de 1983 el Siĉŭan-provinco venis informo, ke speco de bambuo sinarundinario (*Sinarundinaria fangiana*), ĉefa manĝaĵo de grandaj pandoj, floris kaj velkis grandaree kaj la pandoj estas minacataj de malsato. Tiu informo ne nur surprizis la ĉinojn, sed ankaŭ vekis atenton de diverslandaj popoloj.

## KATASTROFA MALSATEGO EN ĈJONGLAJ

En Ĉinio estas ĉ. 1 000 grandaj pandoj, kiuj vivas ĉefe en la montaroj Ĉjonglaj kaj Minŝan de Siĉŭan-provinco, t.e. 500 en Ĉjonglaj, 200 en Minŝan kaj la


aliaj en la Granda kaj Malgranda Ŝjangling-montaroj kaj la montaro Ljangŝan.

La kaŭzo de malsatego kuŝas ĉefe en tio, ke la supre menciita bambuo floris kaj velkis grandaree kaj al la pandoj terure mankas manĝaĵo. Laŭ takso de koncerna departemento de Siĉŭan-provinco, en la montaro Ĉjonglaj estas ĉ. 100 000 hektaroj da tia bambuo, de majo de 1983 ĝis aŭgusto ĉijare 90 000 hektaroj da bambuo floris kaj velkis kaj la aliaj 10 000 hektaroj daŭre floras. Tial la katastrofo en Ĉjonglaj estas la plej serioza.

En Motjanling-regiono de la montaro Minŝan kreskas 80 000 hektaroj da alia bambu-speco fargesio (*Fargesia spathacea*). De 1974 ĝis 1976 40 000 hektaroj da bambuo floris kaj velkis. Pro tio 138 grandaj pandoj mortis de malsato. Kaj floras la ceteraj 40 000 hektaroj da bambuo. En la regiono vivas nur malmultaj pandoj kaj restas parto da bambuo ankoraŭ neflorinta, tial la tiea katastrofo ne estas tre serioza.

Per kio klarigi floradon de bambuo? Tia botanikisto diris, ke la bambuo apartenas al herba familio, ĉiujare el la ĉefaj radikoj elkreskas bambuidoj kaj tio estas nomata senseksa reproduktiĝo. Krome, la bambuo floras kaj velkas post ĉiu kvindeko aŭ sesdeko da jaroj kaj tio estas nomata seksa reproduktiĝo. Post kiam ĝi floras, ĝiaj semoj falas teren kaj denove ĝermas. Post almenaŭ tri aŭ kvar jaroj ili kreskas en tre junajn bambuidojn en formo de kotona fadeno. Kaj post dek aŭ dek kvin jaroj ili fariĝas tiel altaj, ke la grandaj pandoj facile tuŝas ilin per buŝo. Tial la laboro por savi la pandojn en la montaro Ĉjonglaj estas longdaŭra kaj malfacila.

*Malsata pando nutrata*







## **ĈIA MANĜAĴO ESTAS BONA POR MALSATULO**

Minacate de malsato, grandaj pandoj aktivadas nenormale.

Unue, ili forlasas sian hejmlokon. La kampa observa stacio Uji en la Ŭolong-a Naturparko faris punktan kaj spuran observadon al pandoj kun radia kolringo kaj trovis, ke la tieaj pandoj forlasis sinarundinarianon ĉe la alta marnivelo al fargesiaro ĉe la malalta marnivelo. Tamen en gubernio Baŭŝing ĉe la malalta marnivelo kreskas nur malgranda fargesiaro, tial la pandoj devas transiri altajn montojn por serĉi abundajn manĝaĵojn.

Due, ili ne plu evitas homojn por preni de ili manĝaĵon. Sovaĝaj pandoj, ne societemaj, havas malbonan vidkapablon, sed iliaj oreloj kaj nazoj estas tre akraj. Tial estas tre malfacile por homoj proksimiĝi al ili. Tamen nun oni trovis, ke multaj pandoj jam alproksimiĝis al homoj kaj prenis manĝaĵon de ili. Frumatene de la 14-a de aprilo ĉi-jare mi estis vekita el profunda dormo kaj vidis, ke pando Bejbej, kiu antaŭ duon-

monato venis ĉi tien por serĉi manĝaĵon, avide manĝas maizan kaĉon, kiun oni preparis speciale por ĝi. Sub okulpika lamplumo ĝi rapide formanĝis tri bovlojn da kaĉo kaj foriris. Oni vidis la samon en diversaj plagitaj gubernioj.

Trie, ili prenas ĉian manĝaĵon. Tion oni multfoje vidis en la gubernio Baŭŝing. Tie mi atente observis pandan fekaĵon, kiu konsistis el herbo, arboŝelo kaj bestaj ostopecoj, sed malofte el freŝa bambuo.

## **HELPO ANKAŬ DE ALIAJ LANDOJ**

Por savi grandajn pandojn, la ĉina registaro faris multajn klopodojn. S-ro Dong Ĝijong, vicministro de la Ĉina Ministerio de Forstokulturo kaj vicestro de la Ĉina Asocio por Protekto de Sovaĝbestoj, respondecas pri la savlaboro. Li vizitis diversajn plagitajn lokojn kaj ekkonis la situacion. La koncerna ŝtata departemento kaj Siĉŭan-provinco multfoje okazigis kunvenojn por savi pandojn kaj fondis provincan gvidan grupon, ankaŭ diver-

saj plagitaj regionoj kaj gubernioj starigis organizojn por savi pandojn. Laŭ statistiko la ĉina registaro asignis 2.8 milionojn da jŭanoj (ĉ. 1.4 milionojn da usonaj dolaroj) al la savado. Antaŭ nelonge ĝi decidis asigni po 4 milionojn da jŭanoj en ĉiu venonta jaro ĝis 1987.

Diversaj ĉinaj rondoj rapide disvolvis aktivadon de monofero por savi pandojn. Laŭ statistiko de la Ĉina Asocio por Protekto de Sovaĝbestoj, ĝis la fino de junio ĉi-jare la asocio ricevis 1.3 milionojn da jŭanoj. Preskaŭ ĉiutage ĝi ricevis kelkcent konsolajn leterojn kaj telegramojn de diverslokaj infanoj, instruistoj, laboristoj, kamparanoj, armeanoj, oficistoj, sciencistoj kaj teknikistoj.

La savado estas zorgata ankaŭ de aliaj landoj. La japana registaro mobilizis sian popolon al monofero por savi pandojn. Usono starigis la Monkolektan Komitaton kun Nancy, la edzino de prezidanto R. W. Reagan, kiel ĝia prezidanto kaj faris ĝeneralan monkolektan aktivadon. S-ino Nancy jam donis la kolektitajn

13 000 usonajn dolarojn al la asocio dum sia vizito al Ĉinio. La japana filio de la Monda Fonduso de Sovaĝaj Vivaj Estaĵoj donacis 20 malgrandajn aŭtojn. Multaj fremdlandaj amiketoj, amikaj sinjoroj, societoj, ambasadorejoj en Ĉinio, niaj samlandanoj en Hongkong kaj Aŭmen kaj elmigrintaj ĉinoj donacis monon por subteni la savlaboron. Ĝis la fino de junio ĉi-jare la Ĉina Asocio por Protekto de Sovaĝbestoj ricevis de ili pli ol 46 000 usonajn dolarojn. Nun la monsumo kaj aliaj materialoj jam atingis la plagitajn lokojn.

## EFIKAJ RIMEDOJ

Por savi pandojn, la ĉina registaro alprenis jenajn rimedojn.

1. Enketi pri la katastrofo.

Tion oni jam plenumis en la unua duonjaro de 1984.

2. Fari patroladon kaj ĝustatempan savadon. En la plej grave plagitaj gubernioj Baŭŝing kaj Ping'u oni praktikis respondecan sistemon, nome la registaro kontraktas kun tieaj montanoj. Laŭ kontrakto la montanoj devas administri difinitajn montaron kaj arbaron por fari regulan patroladon, konstantan esploradon de la aktivado kaj vivo de pandoj kaj ĝustatempe savi la malsatajn kaj malsanajn pandojn.

3. Premii tiujn montanojn, kiuj protektas pandojn. La loka registaro kompensas ĉiujn perdojn, kiujn kaŭzas pandoj, kiam ili difektas meblojn en domoj aŭ damaĝas plantojn en kampoj por serĉi manĝaĵon. La registaro premias tiujn, kiuj aktive nutras

kaj savas malsanajn aŭ malsatajn pandojn, kaj punas tiujn, kiuj vundas aŭ mortigas pandojn.

4. Por bredi ĉeloke malsanajn kaj malsatajn pandojn, oni sin preparas por konstrui kvar simplajn bredejojn en la gubernioj Baŭŝing, Ping'u, Tjanĉjŭan kaj Ŝimjan, kie estas multaj pandoj.

5. Starigi en ĉiu plagita gubernio taĉmenton por savi pandojn kaj inviti fakulojn gvidi kursojn por kulturaj veterinarojn.

6. Starigi en ĉiu gubernio ĉasistan asocion. Registri ĉasistojn, ĉaspafilojn kaj aliajn ĉasilojn. Doni al la ĉasistoj atestojn pri pafilo kaj ĉasado. Difini specojn kaj kvanton de ĉaseblaj bestoj kaj tempon kaj lokon por ĉasado. Oni severe punas la malobservantojn.

7. Loge kapti kaj transloki pandojn. Tiu laboro jam komenĉiĝis en Baŭŝing, kaj en la komenco de junio ĉi-jare oni jam loge kaptis kaj translokis unu pandon. Tion oni multe faros, akirinte sperton.

8. Laŭplane transloki loĝantojn el naturparkoj.

La supraj rimedoj jam rikoltis rimarkindan efikon. Ĝis la mezo de julio oni savis 27 pandojn de malsano aŭ malsato, el kiuj 11 estis lasitaj en montaron. Ĝis nun nur 27 pandoj mortis de malsano aŭ malsato. Tiu cifero egalas al kvinono de la pandoj, kiuj mortis en Minŝan ĉirkaŭ 1975.

Tamen ĉinaj specialistoj avertis, ke la grandaj pandoj en la montaro Ĉjonglaj suferos gravan malsaton en la venontaj vintro kaj printempo, kiel antaŭ unu jaro. La katastrofo en iuj lokoj fariĝos pli serioza kaj oni neniam malstreĉu la savlaboron.

*Pandido savita de kamparanoj de Siĉŭan plipeziĝis 10 kg. post malpli ol unu monato.*





## Lerta ĉasisto



**F**RU MATENE ĉe montvilaĝeto en Ĝjiŝjan-gubernio de Ŝanŝji-provinco. Leopardo, ĉ. du metrojn longa, subite transsaltinte rokegon, sin ĵetis al maljunulo kun arĝenta longa barbo. En tiu kriza momento la maljunulo, iom sin turnis flanken kaj batis ĝin per sia forta pugno en la facion. Tuj je tio la leopardo falis. La maljunulo premis ĝian kolon per unu gambo kaj ripojn per la alia kaj kaptis ĝian kapon per unu mano kaj la voston per la alia. Li enkaĝigis ĝin. Ĉio ĉi tio daŭris nur pli ol dek sekundojn. Li estas lerta ĉasisto He Gŭangŭej.

Li loĝas en Mengŝjan-gubernio ĉe la Flava Rivero en Henan-provinco. Li aĝas 75 jarojn, kun alteco de 1.70 metroj. Kvankam malgrasa, tamen li posedas mirindan lertecon por kapti tigrojn kaj leopardojn. En la pli-ol-50-jara ĉasado, dank' al sia braveco kaj eminenta luktarto li kaptis 230 leopardojn kaj 7 tigrojn, mortigis 700 aprojn kaj 800 lupojn, ne uzante armilojn, venenon kaj kaptilojn. Tial li estas honorita per la nomo lerta ĉasisto.

### SIN LERTIGI ĈE MAJSTRO

He Gŭangŭej naskiĝis en familio de malriĉa kamparano. Li havis du fratojn. Lia patro laboris kiel dungito ĉe bienulo por vivteni la familion. La patro mortis de batvundo, post kiam li kverelis kun la bienulo pro malkontento pri ties ekspluatado. Tio donis profundan psikan traŭmaton al la juna He Gŭangŭej. Li do decidis lerni luktarton por neniigi ĉian ajn maljustaĵon en la mondo. En sia knabeco li vagadis en la socio, sin vivtenis per kamplaboro aŭ taglaboro en urbo. Kiam li estis 16-jara, li konatiĝis kun la brava tigroĉasisto Ŭang Jan; por esti la disĉiplo li dufoje genuiĝis antaŭ li. Fine Ŭang konsentis akcepti lin kiel sian disĉiplon kaj lernigis al li luktarton. En tri jaroj li ellernis ne nur ludi glavon, bastonon, ĉinan bokson, profundspiran ekzercaron, sed ankaŭ mirindan arton por kapti sovaĝajn bestojn.

He Gŭangŭej neniam postkuris leopardon tien kaj reen por ĝin kapti, sed unue fikse ligis ŝafon per tirŝnuro ĉe la loko nepre trapasota de ĝi. Kaj poste

li sin kaŝis en herbaro for de la ŝafo je 5-6 metroj kaj laŭte kriis imite ŝafon. Kiam leopardo estis allogita tien, li kriante elsaltis kaj okupis plej favoran lokon. Li diris: "La tigro kaj leopardo estas bestoj de feliso kaj ĉiamaniere gardas sian manĝaĵon. Kiam ili vidas homon, ili certe sin ĵetas al li. Jen venas la plej bona ŝanco kapti ilin."

Nun He Gŭangŭej uzas en ĉasado magnetofonon anstataŭ imiti ŝafblekon. Li diris, ke la aparato povas reprodukti ŝafblekon, pri kiu eĉ plej saĝa leopardo ne dubas, tio multe helpis lin. Dum longtempa ĉasado He akumulis riĉan sperton. Laŭ la spuroj de leopardo li ja povas distingi ĝiajn grandecon kaj sekson. Se li ekzamenas ĝian fekaĵon aŭ flaras ĝian kuŝejon, li do povas certigi kien ĝi iras kaj en kiu interspaco ĝi vivas.

### HELPEMA ĈASISTO

He estas helpema. Petite, li ĉiam volonte donas helpon al la petantoj. Foje, li estis lacigita de plurtaga ĉasado en profundaj montoj kaj volis hejmeniri por



riposi. Kiam li trairis montvilaĝeton en Jangĉeng-gubernio de Ŝanĝji-provinco, li trovis ŝafpaŝtiston ploranta. Demandinte, li informiĝis, ke en la lasta nokto leopardo mordmortigis liajn pli ol 60 ŝafojn. Tio vekis ĉe li simpatian. Li decidis neniigi la minacon de la besto por la paŝtistoj. Post ĉeloka observado He konstatis, ke la leopardo ne foriris malproksimen kaj certe revenos por mordi ŝafojn. Li elektis taŭgan lokon kaj embuskiĝis. Li observis tie ĝis la kvara de la sekvanta mateno kaj fine kaptis grandan leopardon. La kamparanoj ĝoje disvastigis tion kaj donacis al li silkan flagon por lin danki. Poste la leopardo estis sendita al parko en Ĝengĝou. En la pasintaj kvin jaroj He jam sendis pli ol 20 leopardojn al zooj en Anĵang, Ljaoĵang, Ĝjaŭzuo, Ŝanhajo kaj Tjanĝin. Iuj el tiuj leopardoj jam naskis idon.

Longtanling estas montvilaĝeto en Tajhang-montaro. Antaŭe tie lupoj kaj aproj minacis la loĝantojn kaj ŝafpaŝtistoj eĉ ne kuraĝis paŝti surmonte. Ĉirkaŭ la vilaĝo kaj kampoj la lokanoj konstruis muron kun alteco de du metroj, sed tio ne malhelpis aprojn damaĝi grenplantojn kaj lupojn vundi homojn kaj brutojn. Invitite de la tieaj loĝantoj He Gŭangŭej kun ĝojo venis tien kaj mortigis 11 aprojn kaj 12 lupojn en la daŭro de duonmonato. Tion multe laŭdis la vilaĝanoj. Li eniris montan kavernon kaj kaptis 6 lupojn. Li diris: "Lupoj estas ferocaj. Sed ili estas obeemaj pli ol hundoj, kiam ili estas en seneliro. Oni povas eltiri ilin unu post alia, kaptante la voston."

Kiel ĉasisto, He Gŭangŭej ĉie likvidas bestan minacon por la popolo kaj protektas la rarajn bestojn laŭ koncernaj difinoj de la ŝtato. Li neniam ĉasas en malpermesitaj regionoj kaj pacience admonas observi la ŝtatan leĝon.

Li estas lerta en kaptado de simioj. Iuj kaŝe esprimis al He, ke ili volas aĉeti altpreze makakon de Tajhang-montaro protektatan de la ŝtato. Tion He rifuzis senhezite. Por protekti makakojn li konscie kaptas iliajn naturajn malamikojn. Li ne kaptas tiujn leopardojn, kiuj vivas en malproksimaj montaroj kaj ne atakas homojn kaj brutojn. Antaŭ ol la ŝtato publikigis leĝon por protekti sovaĝajn bestojn, li ofte mortigis kaptitajn leopardojn, vendis iliajn felon, viandon kaj oston. Sed nun li nutras kaj kuracas la kaptitajn leopardojn por ke ili sane vivu.

He estas helpema kaj protektas rarajn bestojn, tial li estas

multe laŭdata kaj respektata en la socio. En aprilo lastjare li estis elektita kiel membro de la Provinca Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco. Li interkonsiliĝis kun aliaj membroj kiel konstrui la provincon kun pli ol 70 milionoj da loĝantoj.

## FELIĈA VIVO EN MALJUNECO

La familio de He Gŭangŭej havas 11 membrojn, ĉiuj liaj tri filoj jam edziĝis. Ili vivas harmonie kaj feliĉe. Li estas maljuna, sed fortika kaj lerta en ĉasado. Per unu mano li povas levi 40-kilograman pezaĵon sen spirego kaj ofte piediras kurante. He ĉiutage ellitiĝas je la tagiĝo kaj instruas al siaj filoj kaj genepoj luktarton. Dank' al tio liaj tri filoj ĉiuj povas kapti tigron kaj leopardon. Eĉ lia kvar-jara nepino lernas luktarton. He diris: "Miaj infanoj jam bone posedas luktarton. Dum kaptado de leopardo ili ne plu uzas mian metodon, sed anstataŭe ĵetas ĝin surteren, kaptante ĝian voston. Tia metodo estas pli sekura kaj efika, sed nur postulas pli grandan forton."

Nun He kaj liaj familianoj sin vivtenas per ĉasado kiel antaŭe. Laŭ la interkonsentoj ili kaptas bezonatajn sovaĝajn bestojn por diverslokaj parkoj. Por faciligi ilian kaptadon, la parkoj siavice liveras al ili veturilojn, nutraĵojn kaj loĝejon kaj donas al ili certan sumon da rekompenco por ilia ĉasaĵo. Ĉiufoje, kiam li revenas de ĉasado, la genepoj petas lin doni rakonton aŭ demandas tion kaj ĉi tion ĉirkaŭ la ĉasaĵo. La bofilinoj bone zorgas lin en la vivo, kio sentigas al li feliĉon kaj neniom da laco kaŭzita de ĉasado.



ŬEJ LJAŬ:

# Lulilo de muzikistoj



*Biblioteko de la  
konservatorio*

**T**RANSIRINTE la vivoplenan straton Hŭajhaj, mi venis al la Ŝanhaja Konservatorio. Ene vidiĝis gotika konstruaĵo kaŝita en verdaĵo. Super ĝia pinta tegmento ŝvebis milda melodio, kaj tio kredigis, ke mi jam estas en la bela muzika palaco.

Depost la jaro 1978 ĝiaj 20 debutantoj iris sur la mondan scenejon por fari belan prezentadon al la homaro kaj revenis al la patrujo kun brilaj sukcesoj kaj granda honoro.

La mondfama violonisto Isaac Stern foje vizitis tiun unuaklasan konservatorion de Ĉinio kaj diris admire: “Ĉiu ĝia fenestro signifas unu muzikan talentulon!”

## **JUNAJ EMINENTULOJ KAJ ILIAJ INSTRUISTOJ**

“Ĉu via instruisto estas italo aŭ vivis iam en Italio?” Kiam la ĉina sopranulino Hu Ŝjaŭping antaŭ du jaroj gajnis la unuan premion en la Internacia Voĉmuzika Konkurso en Budapesto, oni

demandis ŝin kun miro. Kaj ĉi-jare diplomita studentino Ĝan Manhŭa kaj perfektiganta studento Ĝang Ĝjanĵi de la Ŝanhaja Konservatorio superis ĉiujn aliajn 250 kantistojn kaj gajnis la unuajn premiojn en la Tria Internacia Operkanta Konkurso en Vieno. Tiam oni faris al ili la saman demandon.

Venis denove nea respondo. Kompreneble, oni volis scii, kiel trejni en Ĉinio lernantojn per la ortodoksa itala metodo sen italaj instruistoj kaj kiel la trejnitaj povas atingi tiel altan nivelon.

“Mia instruistino Ĉen Minĝuang studas italajn kantmanierojn, ŝi bone konas mondfamajn kantistojn,” diris Ĝan Manhŭa.

Ĝan naskiĝis en familio sur la Gujĝou-a Altebenaĵo de Ĉinio. En la konkurso ŝi ravis la tutan aŭskultantaron per milda, sonora kaj bela voĉo, harmoniaj tonoj kaj taŭga rapideco. Iu membro de la juĝkomisiono laŭdis ŝin kiel “Reĝinon de Opero”.

“Mia instruistino havas tre akrajn orelojn, ŝi povas tuj trovi malbonajn el miaj voĉsonoj,” daŭrigis tiu 24-jara mezsopranulino, “Ŝi tre malmulte laŭdis min kaj ĉiam emis montri al mi mankojn. Kiam mi aŭskultis ies kantadon, ŝi postulis, ke mi trovu ties fortaĵojn, eĉ tiujn de malpli bona studento. Iom post iom mi kutimiĝis kaj multe profitis el tio. Ĉiufoje mi ĉerpis bonojn el alies kantado por ripari miajn malfortaĵojn.”

La rilato inter Ĝan Manhŭa kaj ŝia instruistino estas tre intima. Ŝi ofte gastas ĉe ŝi libere kiel en sia hejmo. “Kaŭzante al mia instruistino multajn ĝenojn,” ŝi petole diris, “mi pasigis la tutajn somerajn feriojn ĉe ŝi. Kompreneble mi scias, ke ŝi tre volas doni al mi pli da scioj.”

La voĉmuzika fakultato de la Ŝanhaja Konservatorio havas tre kompetentajn instruistojn. S-ino Ĉen Minĝuang estas nur unu ekzemplo. Multaj el ili gajnis

premiojn en internaciaj kanto-konkursoj, sed nun ili volonte sin dediĉas al kulturado de junaj kantistoj. En la longa praktikado ili resumis serion da spertoj en voĉa trejnado. Ilia trejna metodo ebligas al studentoj posedi kompare grandan penetran forton en sonvolumeno, vastigi sonamplekson kaj libere variigi sian voĉon, por ke ili povu riĉe esprimi la penson kaj senton de roloj. Sopranulino Hu Ŝjaŭping sin perfektigis en la Ŝanhaja Konservatorio kaj multe profitis el tiu metodo.

### MARŜO AL LEEDS

En la vasta aŭlo de la konservatorio sidis nur 20-jara junulo, kiu ŝvite ludis pianon. De liaj lertaj manoj flugis bela melodio kaj malaperis en malluma somera nokto.

La ludanto estis Li Ĝjan, studento de la unua klaso de la piana fakultato. En sia okjara aĝo li eklernis pianludon kaj poste ricevis bazan trejnadon de muziko en la mezlernejo sub la Ŝanhaja Konservatorio en la aĝo de 15 jaroj. Ĉiutage li sin ekzercis en pianludo sep horojn. En 1981 la 17-jara Li Ĝjan gajnis la duan grandan premion de pianludo en la Internacia Piana kaj Violona Konkurso "Marguerite Long-Jacques Thibaud". Kaj post tio li estis streĉe sin preparanta al la Internacia Piana Konkurso en Leeds, Britio, okazinta en la 10-a de septembro 1984.

Li Ĝjan estis karakterhava studento. La sistema lernado en la mez- kaj alt-lernejoj kulturis lian muzikan talenton kaj kreskigis lian mempensadon.

"Mi ne blinde sekvas aliajn, eĉ mian instruiston," diris Li Ĝjan. Lia instruisto Li Mingĉjang estas rigardata kiel piana aŭtoritatulo

de Ĉinio, kiu gajnis la unuan lokon de la Unua George-Enescu-a Internacia Konkurso okazinta en 1958.

"La instruisto neniam devigis min blinde sekvi lin," diris Li Ĝjan, "Foje mi ne komprenis aranĝon de iu muzikpeco faritan de li. Tiam li donis al mi sufiĉan tempon por ke mi pripensu tion ĝis mia plena kompreniĝo. Komprenoble mi prezentis mian propran opinion kaj ricevis lian kuraĝigon."

Li Ĝjan estas strebanta al pli alta arta nivelo de pianludo. Li diris: "Mi opinias, ke por vera pianisto lia ludo devas forgesigi la aŭskultantojn pri la ekzisto de la ludanto. Tiam ekzistas nur muziko, nur muziko sola. Ĝuste kiel antaŭ pentraĵo, oni ĝuas nur ĝian belecon. Sed bedaŭrinde mia ludo ankoraŭ ne povas doni tian efekton."

Menciante la pianan konkurson en Leeds, li citis la vortojn de iu fremdlanda muzikisto: "Se

*Li Ĝjan*



*Ĝan Manhŭa kaj ŝia instruistino Ĉen Mingĉjang*







mi pensus nur pri la konkurso, mi ne partoprenus.”

En tiu juna pianisto oni povas vidi firman volon senlace strebi al arta kulmino. Nun li forte penas por atingi la celon sub la ĝusta gvido de fama profesoro Li Mingĉjang.

### RIGORA EDUKA SISTEMO

“Kiuĵ ne volas diligente studi kaj sin ekzerci en la muzika arto, ne povas fariĝi plej bonaj pianistoj kaj komponistoj,” kore diris al siaj lernantoj fama ĉina kom-

ponisto He Luting, la direktoro de la Ŝanhaja Konservatorio.

La konservatorio havas bonan tradicion instrui laŭ difinitaj normoj kaj fari fundamentan ekzercadon al la studentoj. Ĉiu fakultato havas regulon de instrua raporto. Ĉiusemajne oni plenkamplekse ekzamenas lernadon de la studentoj, instruajn metodojn kaj kvaliton de la instruistoj. Tuj post eltrovo de mankoj oni riparas ilin. La diplomitoj nepre devas atingi postulatajn normojn en la fakaj scioj. Kiuĵ ilin ne povas atingi, ne rajtas ricevi diplomon.

Postulate de tiu rigora eduka sistemo, la Ŝanhaja Konservatorio elbakis multajn elstarajn studentojn en la flankoj de voĉmuziko, piano, blovkaj kordinstrumentoj, komponado, direktado, nacia muziko kaj muzika teorio. En la lastaj 6-7 jaroj ĝiaj 20 diplomitoj gajnis premiojn en internaciaj konkursoj kaj 62 diplomitoj — en diversaj ĉinaj muzikaj konkursoj. Oni metas grandan esperon sur la konservatorion, ke pli da muzikistoj estos elkulturitaj en tiu muzika lulilo.



### FORPISIS FAMA ESPERANTISTO ĈIŬ ĜJI

En la 29-a de aŭgusto, ĉi-jare, forpasis en Pekino la 74-jara Ĉiŭ Ĝji, membro de la Konstanta Komitato de ĈEL. Li estis reprezentanto de la Unua, Dua kaj Tria Tutlandaj Popolaj Kongresoj, membro de la Kvina Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco,

konsilanto de la Lingva Instituto de Pekino. Dum multaj jaroj li aktive faris revolucionan aktivadon, propagandis kaj disvastigis Esperanton en kaj eksterlande. Li faris gravan kontribuon al la ĉina Esp-movado. Lia forpaso estas granda perdo de la ĉina Esp-movado.

# Kelkaj antikvaj ĉinaj fabloj

## DIZERTINTO MOKAS DIZERTINTON

Reĝo Huj de Ljang-regno demandis Mengzi\*: “Mi dediĉis mian tutan energion al la ŝtata administrado. Okcidente de la Flava Rivero estis malbona rikolto, mi transloĝigis la tiean partan popolon orienten de la rivero kaj retransportigis grenon al la plagitita loko. Se tio okazos oriente de la rivero, mi faros la samon. Rigardu la najbarajn regantojn, neniu el ili zorgas pri sia popolo tiel kore, kiel mi. Sed la nombro de iliaj loĝantoj ne reduktiĝis, dum tiu de la miaj ne pliiĝis. Kia kaŭzo kuŝas en tio?”

Mengzi respondis: “Via Reĝa Moŝto, vi ŝatas militon, mi do prenu tion kiel ekzemplon. Sur batalkampoj, kiam la tamburoj tondre bruas kaj la batalantoj de ambaŭ flankoj sin ĵetas en miksbatalon, nombro da soldatoj, timigite, forkuras. El ili iuj haltas post cent paŝoj kaj aliaj post kvindek paŝoj. Ĉu estas dece, ke la lastaj mokas la antaŭajn?”

La reĝo respondis: “Ne, ne decas. Ili ĉiuj estas dizertintoj.”

Mengzi diris: “Se Via Reĝa Moŝto tion komprenas, vi do ne esperu, ke la nombro de via popolo superos tiun de viaj najbaroj.”

## NEREALIGEBLA DEZIRO

En Ĝoŭ-regno estis homo, kiu tre ŝatis peltaĵon kaj frandaĵojn. Li deziris valoregan peltsurtuton kaj diris al vulpo, ke li volas ĝian felon. Li volis prepari delikatajn oferaĵojn kaj sin turnis al ŝafo por peti ĝian karnon. Apenaŭ li finis siajn vortojn, la vulpoj forkuris profunde en la mon-

tojn unu post alia kaj ŝafoj mekante sin kaŝis en la densan arbaron. Tial, dum dek jaroj li ne pretigis al si eĉ unu peltaĵon kaj dum kvin jaroj ne sukcesis pretigi ŝaf-viktimon. Kie kuŝas la kialo? Lia plano ne konvenas.



## TIMEGO DE SKRUPULO

Jŭe Ĝuang havis intiman amikon, kiu lin ne vizitis dum longa tempo. Jŭe demandis la kialon. Tiu respondis: “Lastafoje, kiam mi gastis ĉe vi, antaŭ ol mi prenis vinon, mi vidis serpenteton en la taso. Kun abomeno mi ja fortrinkis ĝin. Post tio mi malsaniĝis.” Aŭdinte tion, Jŭe remeroris ke tiufoje ĉe la regalado pendis sur la muro kolore lakita pafarko kun pentrita serpenteto. Li pensis, ke la serpenteto, vidita de lia amiko, certe estis spegulfildo de la arko. Jŭe metis la tason en la antaŭan lokon kaj demandis sian amikon, kion li vidas en la taso de vino. Tiu respondis, ke li vidis la serpenteton same kiel en la lasta fojo. Jŭe do konigis al li la kaŭzon. Aŭdinte tion, la amiko tuj sereni-

ĝis, senskrupuliĝis kaj lia malsano komplete malaperis.

## AVARULO

Simio mortis kaj iris al la plutono, petante ke tiu permesu al li fariĝi homo. La plutono diris: “Se vi volas homiĝi, oni do devas senharigi vin komplete.” Tion dirinte, li tuj vokis diablon ŝiri de li la harojn. Post kiam la diablo elŝiris de li nur unu hareton, li jam kriegis, ne povante elteni la doloron. Kun rideto la plutono diris: “Vi estas avara eĉ je hareto. Kiel vi povas homiĝi?”

## DU BONZOJ

En malproksima loko de Siĉŭan estis du bonzoj: unu riĉa kaj alia malriĉa. Iun tagon la malriĉa diris al la riĉa: “Mi volas pilgrimi al budhoj de la suda maro.” La riĉa demandis: “Per kio vi veturos tien?” “Sufiĉas por mi akvobotelo kaj bovlo.” “Jam de longe mi volis dungi ŝipon por tien veturi, kio ja ne realiĝis. Kiel do efektiviĝos via deziro?”

En la sekvinta jaro revenis la malriĉa bonzo de la pilgrimado.




Li rakontis al la riĉa pri sia vojaĝo. Aŭdinte tion la riĉa bonzo ruĝiĝis de honto.


\* Mengzi (ĉ. 372 — 289 a. K.) estis pensulo en la periodo de Militantaj Regnoj.



# Gejunuloj de Pekino en aŭtunaj vestoj

Fotoj de HAJ FENG













ĜENG ĜENĜJE:


## Laŭmodaj vestoj bonvenaj en Pekino

**P**PROMENANTE sur strato de Pekino, vi trovas okulfrapan ŝanĝon de ĉinoj en la vestado, se vi refoje ĝin vizitas. La kolore monotonaj kaj eksmodaj vestoj estas iom post iom anstataŭigataj per diversfasonaj laŭmodaj vestoj. Por kontentigi la aspiron de homoj al beleco, en la frua aŭtuno ĉi-jare la vestoprojektaj kaj vestoproduktaĵaj entreprenoj de naŭ provincoj kaj urboj de Ĉinio okazigis grandan vesto-ekspozicion en Pekino. Dum la eksponado estis forvenditaj pli ol 3 milionoj da kompletoj da vestoj, inter kiuj troviĝis pli ol 2 000 specoj de novfasonaj vestoj. Samtempe modeloj kaj modelinoj faris prezentadon de la plej nove projektitaj laŭmodaj vestoj.

Komence de aŭtuno ĉi-jare en Pekino eŭropaj vestoj fariĝis tre bonvenaj. La vestofarejo Ĝonghŭa de Pekino sendis al la ekspozicio 3 000 kompletojn da eŭropaj vestoj, kaj en la unuaj 4 tagoj oni forvendis pli ol 400 kompletojn, tiuj por mezaĝuloj kaj maljunuloj elĉerpiĝis rapide. La produkta linio por viraj eŭropaj vestoj importita de la vestofarejo ĉiutage produktas 150 kompletojn kun 30 mezuroj, sed ĝi ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon.

La vestoj de la ekspozicio impresis la vizitantojn per diversaj specoj kaj modernaj fasonoj. La vestoj de Ŝanhajo, kiuj de longe ĝuas grandan renomon en Ĉinio, estas konkure aĉetataj, ĉar iliaj specoj kaj fasonoj estas belformaj kaj renovigitaj. La fama farejo de virinaj vestoj "Nova Mondo" de Ŝanhajo projektas vi-

rinan jakon el du specoj de lanŝtofo, imitante japanan laŭmodan fasonon, kiu bone taŭgas por sidi sur gracia virina korpo, impresante per juneco. La vestofarejo Jingĉun de Ŝanhajo produktas vesto-seriojn, kiuj konsistas el tri ĉemizoj, du jupoj kaj unu pantalonon. Ĉiu serio kostas nur 55 jŭanojn, tamen ĝi povas kombiniĝi en 18 fasonojn. Ĝi ravas la junulinojn, aspirantajn al novaj belaj fasonoj. La farejo de lanŝtofaj vestoj Ĝentaj de la urbo Ĉingdaŭ produktas jaketojn kun longa ŝalo kaj vespertaj manikoj kaj mallongan pantalonon kovrantan la genuojn, faritajn el du ŝtofoj nigra kaj flava. Tiaj vestoj havigas al siaj portantoj pli da junulina ĉarmeco kaj apudmaran romantikan koloron. La Tjanĝina Vestofarejo Bohaj projektas frosto-rezistan veston kun tri-uzo kolumo. En la unua tago oni eksponis 200 tiajn vestojn kaj en tre mallonga tempo ili estis forvenditaj. Post nur kelkaj tagoj, en stratoj de Pekino oni trovis, ke iuj portas vestojn de novaj fasonoj aĉetitajn en la ekspozicio.



*Montrado de modaj vestoj*

Nemalmultaj kamparanoj de la ĉirkaŭurbo de Pekino riĉiĝis, kaj ankaŭ ili venis al la ekspozicio por aĉeti laŭmodajn vestojn. La ekspozicio aranĝis apartan viziton por kamparanoj, kio neniam okazis antaŭe.

Post la granda debito sekvis la alttajdo de vestoprojektado. Projektistoj de vestofarejoj klopodis kolekti informojn pri merkato kaj opiniojn de konsumantoj por senĉese renovigi vestoprojekton.



*Vesto - ekspozicio de naŭ municipoj kaj provincoj*

# Kvin principoj — la baza garantio por defendi la mondpacon

de LIN MIN

**30**jaroj forpasis de la naskiĝo de la kvin principoj de “reciproka respekto al suvereneco kaj teritoria integreco, reciproka neagreso, reciproka neinterveno en internajn aferojn, egaleco, reciproka utilo kaj paca kunekzisto”. Ili, kiel gvidaj principoj en la internaciaj rilatoj, estis iniciatitaj kune de Ĉinio, Hindio kaj Birmo en 1954, kiam la tiama ĉina ĉefministro Ĝou Enlaj vizitis Hindion kaj Birmon. Nun la kvin principoj estas jam aprobitaj de multaj landoj en la mondo kaj fariĝis bazaj principoj inter diversaj landoj en traktado de la reciprokaj rilatoj.

La kvin principoj pri paca kunekzistado prenis egalecon inter la suverenaj ŝtatoj kiel bazan deirpunkton, resumis la observendajn bazajn principojn en la internaciaj rilatoj, precipe en la reciprokaj rilatoj. Ili prenis la reciprokan respekton al la suvereneco kaj teritoria integreco, reciprokajn neagreson kaj neintervenon en internajn aferojn kiel la bazon por starigi normalajn rilatojn inter diversaj landoj, egalecon kaj reciprokan utilon kiel la necesan kondiĉon en la internaciaj interŝanĝoj kaj kunlaboroj sub normalaj rilatoj. En la pasintaj 30 jaroj la monda fizionomio havis profundan ŝanĝiĝon, ankaŭ la kvin principoj eltenis provon en la tumulta internacia situacio kaj montris grandan vivforton.

Post la Dua Mondmilito, en la internacia politiko aperis senprecedence vasta batalo de la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj popoloj por naciaj sendependeco kaj libereco. Multaj aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj rompis kolonian regadon kaj akiris naciajn sendependecon kaj liberecon. Sed ili, kiel nova forto sur la internacia politika areno, ankoraŭ suferis de kateno, ekskludo kaj opono de la malnova internacia ordo, pro tio, defendi kaj fortikigi la jam akiritan politikan sendependecon estis urĝe necese por tiuj ŝtatoj. La kvin principoj pri paca kunekzistado naskiĝis ĝuste en tia historia kondiĉo, tial ili havis klaran karakterizaĵon de tiu historia tajdo. En la pasintaj kelkaj jarcentoj, la internacia socio estis regata de la konceptoj, kiaj neegaleco inter grandaj kaj malgrandaj landoj, la suverenaj principoj nur por la “civilizacia mondo”, milito estis “leĝa rimedo” por efektiviĝi la eksterajn politikojn. Agreso de granda kaj potenca lando kontraŭ malgranda kaj malforta, subpremado fare de riĉa lando kontraŭ malriĉa ofte okazis en la internaciaj rilatoj. La kvin principoj, ĝuste kiel kontraŭaĵo de tiuj netolereblaj konceptoj kaj fenomenoj, aperis en la monda areno kaj metis bazon por starigi novajn internaciajn rilatojn. Tiuj principoj enkorpigis la spiriton

de UN-ĉarto kaj reprezentis la komunan deziron de la diverslandaj popoloj.

La kvin principoj estas bazaj principoj por trakti la rilatojn inter ĉiuj landoj. Ili taŭgas por direkti la rilatojn ne nur inter la ŝtatoj kun malsamaj socisistemoj, sed ankaŭ inter la ŝtatoj kun sama socisistemo. La faktoj pruvis, ke la ŝtatoj kun malsamaj socisistemoj povas pace kunekzisti kaj amike kunlabori, se ili observas la kvin principojn; alie, eĉ inter la ŝtatoj kun sama socisistemo povas okazi akra antagonismo kaj konflikto. Se ĉiuj landoj en la mondo prenis la kvin principojn pri paca kunekzistado kiel kriterion por traktado de la reciprokaj rilatoj, do la mondo vivus en paco kaj harmonio.

La paca kunekzistado estas por ni sola alternativo. La karakterizaĵoj de la nuna epoko estas interkruciĝo, interpenetrado, interefiko kaj reciproka detenado de kontraŭdiroj de plurspecaj politikoj kaj ekonomioj. Pro rapida disvolviĝo de la ekonomio kaj tekniko, la nuna monda merkato, konsistanta el diversaj landoj dependantaj unu de la alia, anstataŭis la pasintajn regionajn merkatojn kaj fermitecon de nacioj per memprovizado. La diversaj landoj en ekonomio estas pli dependaj unu de la alia kaj pli influataj reciproke ol iam ajn en



la pasinteco, tial la ekonomia kresko aŭ depresio de unu lando ofte influis aliajn landojn kaj kaŭzis ĉen-reakcion internacie. La historiaj spertoj plurfoje montris, ke ju pli prosperas la ekonomio de diversaj landoj, des pli disvolviĝas ilia ekonomia interfluo; kaj ju pli disvolviĝas la ekonomia interfluo, des pli altiĝas la popola vivnivelo kaj la scienc-teknika nivelo en la mondo. En la nuna mondo kun plurspecaj sociaj formoj kaj unu monda merkato, ĉiu ajn lando devas nur praktiki la kvin principojn pri paca kunekzistado kaj aldonas novan enhavon al tiuj ĝeneralaj principoj, t. e. plie efektiviĝi amikan kaj kunlaboran kunekzistadon surbaze de paca kunekzistado por akiri komunajn disvolviĝon kaj progreson.

La kvin principoj pri paca kunekzistado estas la baza politiko de Ĉinio en traktado de la rilatoj inter ĝi kaj aliaj landoj kaj la angulŝtono de ĝiaj eksteraj politikoj.


En la pasintaj 30 jaroj, observante la kvin principojn, Ĉinio solvis komplikajn landlimajn pro-

blemojn historie lasitajn kun plejparto de niaj najbaraj landoj; Ĉinio starigis kaj disvolvis kun plej multaj landoj en la mondo diplomatian rilaton sur la bazo de egaleco, reciproka utilo kaj amika kunlaboro. En la pasintaj 30 jaroj Ĉinio donis helpojn al proksimume 80 landoj de la Tria Mondo kaj plenumis por ili pli ol mil konstruojn grandajn, mezajn kaj malgrandajn, kvankam ankaŭ ĝia ekonomia forto estis malgranda. Samtempe kun tio ankaŭ Ĉinio ricevis multan helpon de la suda-suda kunlaboro. Nun Ĉinio jam disvolvis scienc-teknikajn kunlaboron kaj interŝanĝon kun pli ol 70 triamondaj landoj kaj multe plifortigis kolektivajn, memhelpan kapablon de la tria mondo. En la rilatoj kun evoluintaj landoj, Ĉinio disvolvis amikajn rilatojn kun ili kaj disvastigis politikan, ekonomian, kulturen kaj scienc-teknikan interŝanĝon kaj kunlaboron, en egala interkonsiliĝo surbaze de la spirito de la kvin principoj. Koncerne la ambaŭflankajn malsamajn opiniojn kaj kontraŭdirojn, Ĉinio klopodis racie solvi ilin per

egala interkonsiliĝo. En la rilatoj kun socialismaj landoj, Ĉinio serioze plenumis la kvin principojn pri paca kunekzistado, konservas kaj disvolvas bonajn rilatojn kun iuj landoj kaj klopodas plibonigi rilatojn kun aliaj landoj.

La 30-jara historio de la kvin principoj montris, ke praktiko de la principoj en la internacia socio estas baza garantio por defendi la mondan pacon, disvolvi la ekonomion kaj efektiviĝi komunan prosperon. Ankaŭ la historio montris, ke la vera efektivigo de la principoj ankoraŭ bezonas komunan klopodon de la popoloj de la tuta mondo, precipe la solidaran kunlaboron kaj klopodon de la evoluantaj landoj.

Ĉinio estas unu el la iniciatintoj de la kvin principoj pri paca kunekzistado, kaj nun la kvin principoj estas jam oficiale skribitaj en la ĉinan konstitucion, tio montris, ke la ĉina popolo volas progresi kaj prosperi kune kun la tutmondaj popoloj. La ĉinaj registaro kaj popolo ĉiam estos aktiva plenumanto kaj firma defendanto de la kvin principoj.



## Lokoj Menciitaj en Ĉi Tiu Numero

1. Pekino
2. Ĝiŭĉjŭan (de Gansu)
3. Ĝjaju-pasejo (de Gansu)
4. Ĉuŝjan-gubernio (de Anhuĵ)
5. Ĉjufu (de Ŝandong)
6. Guĵoŭ-provinco
7. Siĉŭan-provinco
8. Ŝanhajo
9. Nankino
10. Hongkong

# La patrolando en mia koro

---

**S**-INO Ŭej Ju, 44-jara reprezentanto de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, estas vicprofesoro de la Nankina Politekniko. Jam en element-, mez- kaj altlernejoj ŝi ricevis altajn notojn por ĉiuj lernobjektoj. Februare de 1979 ŝi eklernis en FR Germanio. Por plenumi sian studon kaj esploran taskon de pli ol du jaroj ŝi venkis multajn malfacilojn kaj fine fariĝis la unua ĉina doktorino pri elektroniko. Hodiaŭ ŝi kaj ŝiaj kamaradoj ne ŝparas penon por daŭra esplorado de elektroniko.

— La Red.

---

Je la 7-a de februaro 1979, la 39-a datreveno de mia naskiĝo, mi vojaĝis al FR Germanio por studo. Kirliĝis mia penso, ĉar mi

ankoraŭ ne ellernis la germanan lingvon, kaj krome, mi estis patrino de du infanoj, mi ne havis tian energion kaj tian memoron


kiel en la juneco. Ĉu mi povus plenumi la taskon?

Faktoj pruvis, ke mia maltrankvilo ne estas senkaŭza. Dum du




Ŭej Ju kaj ŝiaj instruistoj profesoroj H. Doring (maldekstre) kaj Schmidt post ekzameno





Medalo Borcher



Diplomo pri la doktoriĝa disertacio de Ŭej Ju


jaroj kaj dek monatoj mi renkontis multajn neimageblajn malfacilojn en mia studo kaj esplora laboro. Atinginte Germanion, mi decidis unue uzi sep semajnojn por lerni la germanan lingvon kaj poste studi plue kaj fari esploran laboron en la altfrekvenca instituto de la Politekniko de Aachen. Ekster mia atendo mi ne sukcesis glate trapasi la lingvan provon. Veninte al la instituto, mi kun peno povis legi iujn scienc-teknikajn librojn, sed ne posedis kapablon aŭskulti lekcion, por ne paroli pri partopreno en akademia diskuto. Tial, antaŭ ol unuafoje viziti mian direktoron profesoro H. Doring, mi devis prepari kaj parkerigi mian parolon. Tamen tio ne povis kovri mian malbonan lingvan bazon. Komplete malkaŝiĝis mia mallertajo antaŭ la profesoro. Komence li miris kaj ĝojis pro tio, ke mi eldiris mian penson per

unu spiro. Sed post longa interparolo li trovis, ke mi komprenis nenion. Li vidis min tre maltrankvila, kun vizaĝo ŝvitanta, kaj konsolis min: "Prenu manĝon de nun kune mia helpanto." Mi ne kaptis eĉ la plenan sencon de lia diro. Mi komprenis nur "prenu manĝon" kaj fariĝis pli maltrankvila. Mi haste diris: "Ne, mi venis ne por manĝo, sed por studo." Tamen la profesoro traktis min afable, anstataŭ moki min. Sed poste diskoniĝis la ridindaĵo. Ĉiufoje dum la manĝado miaj kolegoj en la altfrekvenca instituto ŝerce diris: "S-ino Ŭej venis ne por manĝo, sed por studo."

La amika ŝerco tamen forte tuŝis min kaj memorigis min, ke antaŭ mia ekveturo al Germanio mia instruisto de la Nankina Politekniko profesoro Lu Ĝongzŭo diris al mi: "La vojaĝo ŝarĝas vin per grava tasko." Ankaŭ la maljuna lernejestro Liŭ Ŝjueĉu

diris, ke mi bone utiligu la ŝancon. En Germanio mi klare vidis, ke kompare kun avangardaj landoj la scienca kaj teknika nivelo de Ĉinio ja estas malalta, ni devas strebi por kuratingi ilin, alie realigi la kvar modernigojn estas neeble. Mi konsciis, ke mi portas nerifuzeblan devon por prosperigi Ĉinion. Sekve mi kaptis ĉiun okazon por lerni la germanan lingvon, kiun mi posedis post ĉirkaŭ kvar monatoj.

Mia plej granda malfacilo en la studo estis verki disertacion por doktora titolo. Kiam profesoro Doring proponis, ke mi turnu min de mia studo al tiu por doktoreco. Mi hezitis pri la decido. Sed, informiĝinte pri tio, la gvidantoj de la Nankina Politekniko skribis al mi leteron, ke mi strebu al tia titolo kaj faru ĉion eblan por atingi la celon. Mi do turnis min al la nova studo.



*Üej Ju (la tria de dekstre) kaj ŝiaj studentoj*

Mi konsumis ok monatojn por legi materialojn kaj plenumi la disertacion. Mi uzis la tutan libertempon. Pro la streĉeco mi remalsaniĝis. Mi sentis, ke la sango en mia korpo suprenkuras al la kapo. Kelkfoje abunde sangis mia nazo. Mi ignoris tion kaj persistis en la studo. Mi tiam ne povis bone verki disertacion en la germana lingvo. Mi do unue verkis ĝin en la ĉina lingvo kaj poste germanigis ĝin. La rigora profesoro redonis al mi ĉiun mian nekontentigan skribaĵon, kio multe helpis min plenumi akademian disertacion. Mi estis tiel laca, ke mi preskaŭ ne povis firme stari sur la piedoj, kiam mi supreniris sur ŝtuparo. Tio maltrankviligis miajn kolegojn en la instituto. Nur post kiam mi plenumis la disertacion, iliaj koroj faciligis.

Mia klopodo ricevis rekompencan. Fine mi akiris ne nur la titolon de doktoro, sed ankaŭ honoran medalon iniciatitan de la politekneŝtro kaj la fondinto de la lernejo, laŭ la tradicio de la Politekniko de Aachen. Oni donis al mi kaj alia germana studento po unu medalon Borchers. En la tago de la diplomitiĝa ce-

remonio miaj kolegoj faris por mi doktorinan ĉapelon malantaŭe kun longa harligo plektita el diverskoloraj silkaj fadenoj. Ili metis en ĝin kelkajn blankajn silkajn fadenojn en la harligon por simboli mian klopodon. Kiam la lernejestro donis al mi la medalon, mi larmis de ĝojo.

Ankaŭ profesoro Doring tre ĝojis, ĉar mi estis unu sola virino el la de li direktitaj 80 lernantoj. Ĝenerale, la germanaj virinoj ne lernas la elektronikan fakon. Oni ne komprenis, kial mi, mezaĝa virino, povis sukcese studi por doktora titolo de elektroniko.

Reveninte al la patrujo en la komenco de 1982, mi havis multon por fari. Post serioza preparo ni oficiale starigis en majo 1985, dank' al subteno de la gvidantoj de la Nankina Politekniko, biomedicinan-elektronikan sekcion sub la elektronika instituto. Dekkelkaj personoj de nia sekcio, krom fervore fari esplorojn, ankaŭ bone direktas studentojn. Pro multaj aferoj kaj malmultaj manoj ni ofte estis ŝarĝitaj per pluslaboroj, sed neniu el ni plendas. Mi havas pli da laboroj. Mi devas ne nur zorgi pri dekelkaj

esploraj temoj, sed ankaŭ direkti kvin esplorajn studentojn, partopreni en diversaj akademiaj aktivadoj kaj akcepti vizitantojn, tial mi dediĉas al la laboro preskaŭ ĉiujn miajn postlaborajn horojn, escepte de la semajnfina vespero kaj la posttagmezo de dimanĉo.

Mia familio havas kvar membrojn. Mia edzo U Ĉongĵuo laboras kiel docento de la elektronika inĝeniera fakultato ankaŭ en nia lernejo. Mi havas du filojn. La unua lernas en supera mezlernejo en nia urbo kaj la alia en la Mezlernejo sub la Ŝanhaja Konservatorio. Ni malofte kunestas, malmulte zorgas unu pri alia. Nur en la someraj kaj vintraj ferioj nia familio povas kunvivi kaj tiam ni prizorgas ilin kaj kuraĝigas ilin diligente lerni por estonte kontribui al la patrolando. Dank' al diligenta edukado de siaj instruistoj kaj nia prizorgado la knaboj ricevas altajn notojn.

Ankaŭ mia edzo ofte partoprenas en diversaj eksterlernejaj sciencaj aktivadoj por progresigi sian instruadon kaj esploran laboron. Tial ni havas malmultan liberan tempon. Iam oni demandis min, kial mi energie laboras en tago kaj nokto. Tiam mi eldiris nur jenajn pensojn: unue, kompare kun la avangardaj landoj Ĉinio ne estas tre potenca kaj pro tio mi devas diligente labori; due, en esplorado de elektronika teorio Ĉinio ne estas estiĝinta, sed devas klopodi en la aplikado; kaj trie, la sciencoj en la mondo senĉese progresas, ni devas novigi niajn sciojn. Ĝuste pro tia amo al la patrolando mi kaj miaj kolegoj, utiligante simplajn instalaĵojn, plenumis en malpli ol du jaroj tri taskojn pri apliko de mikrokomputero en esplorado de bioinĝeniera scienco.



# Kulturo de la dinastioj

## Ming kaj Ĉing

de BA HONG

### AKADEMIAJ PENSOJ

Dum la dinastioj Ming (1368-1644 p. K.) kaj Ĉing (1644-1911 p. K.) la regantoj praktikis krue- lan despotan politikon super kul- turaj rondoj, tamen ankoraŭ ape- ris multaj progresaj pensuloj, in- ter kiuj la reprezentantoj estis Li Ĝi, Hŭang Zonŝji, Ŭang Fuĝi kaj Daj Ĝen.

Li Ĝi (1527-1602 p. K.) publi- ke nomis sin herezulo. Li elmetis



Li Ĝi

la opinion, ke “vestado kaj man- ĝado estas vero en la vivo”, em- fazis materian utilon, forte kriti- kis tradiciajn feŭdajn dogmojn kaj malkaŝis hipokritulojn. Li opiniis, ke konfuceanismo, rigar- data de la regantoj kiel ortodoksa dum la pasintaj jarmiloj, jam ne devas esti plu rigardata kiel krite- rio de la vero. Li Ĝi iniciatis egalrajtecon inter viroj kaj viri- noj, opiniante, ke la juĝkapablo

de virinoj ne estas malpli granda ol tiu de viroj. Fine lin arestis re- gantoj, akuzante ke li “aŭdacis instigi ribelon kontraŭ moralo, konfuzi kaj trompi la popolon”. Li mortis de la persekutado.

Hŭang Zongŝji (1610-1695 p. K.) partoprenis en batalo kon- traŭ la manĉuraj armeoj en sia juna aĝo. Post pereco de Ming- dinastio li vivis ermite kaj oku- piĝis pri verkado. Li senkompte malkaŝis kaj vipis la feŭdan des- potan sistemon. Li diris, ke la aŭtokratio jam fariĝis “granda malutilo por la lando”, la monar- koj masakras popolanojn por kapti la regpotencon, kaj post la fondo de la reĝimo ili senbride ekspluatas kaj subpremas la po- polon por fortikigi sian regadon. Ĉar la monarkoj agas ne por la popolo, iliaj subuloj ne devas sin oferi por la monarkoj. Lia penso certgrade influis la postan bur- ĝaran demokratian revolucion.

Ŭang Fuĝi (1619-1692 p. K.) ankaŭ partoprenis en la batalo kontraŭ la manĉuraj armeoj en sia juna aĝo. Post malvenko li ermite vivis longtempe kaj oku- piĝis pri akademia verkado en sia maljuneco. Li opiniis, ke la mon- do konsistas el materio, la spirito estiĝas el materio, kaj sen materio ne ekzistas la spirito. Li opiniis ankaŭ, ke konado estiĝas de ob- jektivaj aferoj, dum la objektivaj aferoj ekzistas sendepende de subjektiva konscio de la homo.

Li opiniis, ke praktiko entenas konon, sed kono ne povas ansta- taŭi praktikon. La filozofia penso de Ŭang Fuĝi estis resumo de la ĉina antikva naiva materiismo kaj okupis gravan lokon en la filozo- fia historio de Ĉinio.

Daj Ĝen (1723-1777 p. K.) forte oponis kontraŭ ideisma filo- zofio. (Pri la ideisma filozofio, legu la artikolon “La Ĉina Anti- kva Filozofio” en la 11-a numero de 1983, EPĈ) Li montris, ke la ideisma filozofio, kiel “leĝo” praktikata de kruelaj ŝtataj ofi- cistoj, estas instrumento por sub- premi la popolon; la kruelaj ofi- cistoj “mortigas homojn per la ‘leĝo’”, dum la ideismaj filozofoj “mortigas homojn per ideisma filozofio”, la lasta instrumento estas pli feroĉa ol la antaŭa, ĉar neniu kuraĝas simpatii kun la mortigitoj. Li havis atingojn en pluraj sferoj, precipe en esplorado de antikvaj materialoj.

### SCIENCO KAJ TEKNIKO

En la 16-a jarcento kaj la an- taŭa duono de la 17-a jarcento, la scienco kaj tekniko de Ĉinio ankoraŭ iris en la fronto de la mondo. Tiam aperis pluraj famaj sciencaj verkoj, kiaj farmakopeo “Ben Caŭ Gang Mu”, agronomia enciklopedio “Nong Ĝeng Ĉjŭan Ŝu”, agronomia kaj metia enci- klopedio “Tjan Gong Kaj U” kaj “Vojaĝnotoj de Ŝju Ŝjake”.


La aŭtoro de “Ben Caŭ Gang Mu” Li Ŝjiĝen (1518-1593 p. K.) jam en sia juna aĝo decidis heredi la profesion de sia patro kaj poste fariĝis kuracisto. Trovinte, ke la antaŭaj farmaciaj verkoj



Li Ŝiĝen

de Ĉinio havas multajn erarojn, malordan klasifikon kaj grandan nekompletecon en ekspliko pri drogoj, li decidis kompili novan farmacian verkon. Dum 30 jaroj li referencis pli ol 800 librojn, vizitis multajn lokojn por fari esploradon kaj fine kompilis la farmakopeon post tri grandaj revizioj. “Ben Caŭ Gang Mu” kun 52 volumoj, eksplikis 1 892 specojn de drogoj kaj notis 11 096 efikajn receptojn. Li faris detalajn klarigojn pri la nomo, funkcio, preparado de ĉiu drogo kaj aldonis ilustraĵojn. Li faris revizion ankaŭ al koncernaj verkoj de antaŭuloj. La verko estas ne nur farmakopeo, sed ankaŭ grava verko pri botaniko, zoologio kaj mineralogio. La atingoj de Li Ŝjiĝen estas alte taksataj de diversaj landoj. La farmakopeo estis tradukita en la lingvojn japanan, latinan, germanan, francan, anglan kaj rusan.

La aŭtoro de “Tjan Gong Kaj U” estis Song Jingŝing (1587-ĉ.



La unua eldono de «Tjan Gong Kaj U»

1660 p. K.). Li verkis tiun sciencan libron, resuminte la tiamajn produktajn teknikojn de agrikulturo kaj metio. Ĝi pritraktis la semadon, plantadon, rikoltadon kaj prilaboradon de agrikulturaj plantoj, faradon de salo kaj sukero, vegetala oleo kaj alkoholaĵo, ŝpinadon, teksadon, tinkturadon, produktadon de brikoj, tegoloj, porcelanaĵoj kaj papero, mineralan ekspluatadon, metalan fandadon, muldon kaj forĝadon de metalaj instrumentoj, utiligon de kalko, aluno, sulfuro kaj karbo, faradon de armiloj, pulvo, ĉaro, ŝipo, juvelo kaj aliaj. Krome en la libro estas detalaj priskriboj ilustritaj pri diversaj materialoj uzataj en la produktado kaj pri la produkta proceso. La libro poste estis portita al Japanio kaj Eŭropo kaj honorita kiel “teknologia enciklopedio de Ĉinio en la 17-a jarcento”.

La aŭtoro de “Nong Ĝeng Ĉjŭan Ŝu” Ŝju Gŭangĉji (1562-1633 p. K.) faris sciencajn esploradojn, kombinante okcidentajn avangardajn sciencajn sciojn kaj ĉinajn sciencojn kaj teknikojn, kaj akiris novajn sukcesojn en

esplorado de astronomio, matematiko, biologio kaj agronomio. Li faris elstarajn kontribuojn precipe en biologio kaj agronomio, tiuj esploraj fruktoj estis kolektitaj en “Nong Ĝeng Ĉjŭan Ŝu”. Tiu verko pritraktis kulturadon de grenaj plantoj, kotono, kanabo, legomoj, bambuoj, arboj, farmaciaj plantoj, moruso, bredon de silkraŭpoj, faradon de agrikulturiloj, bredon kaj paŝtadon de brutoj, akvoadministrado kaj aliajn. La verko kolektis pasintajn koncernajn materialojn kaj ankaŭ prezentis la opiniojn de la aŭtoro. Ĝi estis grava agronomia verko en la lasta periodo de Ming-dinastio.

La fama geografo Ŝju Ŝjake (1586-1641 p. K.) vivis en la lasta periodo de Ming-dinastio. Li faris dum sia vivo esploran vojaĝon tra la tuta lando. “Vojaĝnotoj de Ŝju Ŝjake” estis lia resumo en 30-jara esplorado pri la montoj kaj riveroj de Ĉinio. En sia verko li faris detalan rakonton pri la fenomenoj de geografio, hidrologio, geologio, botaniko kaj aliaj, kaj per tio li malfermis novan vojon de geografio pri siste-



maj observado kaj priskribo de la naturo. Li faris detalan esploron al la sudokcidenta parto de Ĉinio, detale kaj science registris dislokiĝon, specaron, formiĝon kaj agrikulturan utiligon de tiu-regiona karsto. Tiu libro estis la plej frua verko pri karsta esplorado en la mondo. En tiu ĉi regiono li esploris pli ol cent kavernojn kaj havis precizajn priskribojn kaj profundajn konojn pri la strukturo kaj formiĝo de kavernoj kaj stalaktito. Li estis la unua persono kiu faris tian esploron en la mondo.

## LITERATURO


En la periodo de la 14-a ĝis la 18-a jarcentoj (inkluzive) aperis multaj famaj romanoj, kiuj spegulis de malsamaj flankoj la komplikajn sociajn konfliktojn kaj klasbatalon de la dekadencan feŭda socio de Ĉinio. "Tri Regno", "Ĉe la Akvorando", "Pilgrimado al la Okcidento", "Notoj pri Strangaĵoj de Ljaŭĝaj", "Songo en la Ruĝa Buduaro" ĉiuj estas majstroverkoj.

La historia romano "Tri Regno" estis verkita de Ljao Ĝuanĝong (ĉ. 1330-ĉ. 1400 p. K.). La romano priskribis la ĉinan historion en la periodo 184-280 p. K., koncentre la politikajn kaj militajn batalojn inter la feŭdaj regantaj klikoj dum la periodo de la regnoj Ŭej, Ŝu kaj U. Ĝi malkaŝis la dekadencan kaj malluman feŭdan socion kaj la ferocan kaj kruelan regantaron, montris la suferegon de la popolo kaj la gigantan skalon de la kampara ribelo. Tiu verko ne nur prezentis al la legantoj riĉajn historiajn sciojn kaj politikajn kaj militajn batalpartojn, sed ankaŭ kreis multajn tipajn figurojn de malsamaj karakteroj. Ĝi havis grandan influon sur la ĉinan literaturan historion kaj reprezentis la brilan

sukceson de la ĉinaj historiaj romanoj. Depost tiam prosperis historiaj romanoj. La aferoj de la diversaj historiaj periodoj de Ĉinio estis spegulitaj en romanoj.

La romano "Ĉe la Akvorando" estis epopeo pri kamparana revolucio. Ĝi rakontas pri la ribelantaj kamparanoj de Ljangŝanpo (en la nuna Ljangŝan-gubernio, Ŝandong-provinco) en la lastaj jaroj de la Norda Song-dinastio (960-1126 p. K.). Kun la temo "popolanoj ribelas devigite de ŝtataj oficistoj", ĝi malkaŝis la kruelan kaj dekadencan bienulan regantaron kaj prikantis la bravajn ribelantojn. Ĝi havas zigzagajn intrigojn, vivecan lingvon, multajn heroojn kun distingiĝa karaktero kaj altan efekton de arto. La romano kuraĝigis la subprematajn laborantajn popolojn kaj vekis malamon ĉe la feŭda regantaro. Ĝi, same kiel "Tri Regno", havis profundan influon sur la postajn romanojn, dramojn kaj popolan literaturon. Oni diris, ke ĝia aŭtoro estis Ŝi Naj'an, kiu vivis probable en la 14-a jarcento.

"Pilgrimado al la Okcidento" estas eminenta mitologia romano aperinta en la meza periodo de Ming-dinastio. Ĝi rakontas pri la pilgrimado de la fama bonzo Ŝjŭanzang kaj liaj disĉiploj Sun Ukong k. a. al la Okcidento por peti budhismajn sutrojn. Ĝia aŭtoro U Ĉeng'en (1500?-1582 p. K.) diris, ke li verkis la mitologiajn rakontojn por esprimi la "ŝanĝiĝojn de la homa mondo" kaj doni "konsilojn" al la popoloj. La ribelo de la dia simio Sun Ukong kontraŭ la ĉiela palaco, infero kaj lia superado de demonoj priskribitaj en la romano efektive montris la deziron de la popolo renversi la feŭdan regordon. Lia priskribo pri la demonoj ĝuste spegulis la malbonulojn



*Ilustraĵo el «Ĉe la Akvorando» eldonita en Ming-dinastio*

de la tiama socio. Sed ĝi portis ankaŭ iom da koloro de feŭda moralo kaj religia superstiĉo.

"Notoj pri Strangaĵoj de Ljaŭĝaj" estas novelaro aperinta en la komencaj jaroj de Ĉing-dinastio. Ĝia aŭtoro Pu Songling (1640-1715 p. K.) esprimis sian sintecon al la tiama socia vivo per rakontoj pri fantomoj kaj personigitaj vulpoj. Ĝiaj noveloj plejparte prenis amon kiel la temon. En tiuj noveloj la aŭtoro prikantis gejunulojn strebantajn por sia edziĝa sendependeco kaj malkaŝis krimon de la feŭdaj etikoj. En aliaj verkoj la aŭtoro malkaŝis la koruptadon en la imperiestra ekzamena sistemo. Krome, la aŭtoro malkaŝis en siaj multaj verkoj kruelan subpremadon de feŭdaj regantoj al la popoloj.

"Songo en la Ruĝa Buduaro" aperinta en la mezo de la 18-a

jarcento estas granda realisma verko el la klasikaj romanoj de Ĉinio. En la pasintaj pli ol 200 jaroj post sia apero ĝi ĉiam altiras atenton de la socio per siaj pensoj kaj artaj fortoj. La romano grandparte priskribas la tragedion de la amo inter Ĝja Baŭju kaj Lin Dajju, ribelantoj de la feŭdaj etikoj, kaj la prosperiĝon kaj kadukiĝon de la familio Ĝja, ĝi malkaŝas la diboĉan vivon de la bienula klaso kaj nobeloj kaj montras la dekadencan de la



*Caŭ Ŝjueĉin*

feŭda socio. La aŭtoro kreis per saĝa arta artifiko multajn artajn

figurojn kun tipa karaktero. La romano atingis la kulminon de ideologio kaj arto en la klasikaj romanoj de Ĉinio. Ĝia aŭtoro Caŭ Ŝjueĉin (1715?-1763 p. K.) devenis de nobela familio kaj en siaj lastaj jaroj vivis mizere en la okcidenta antaŭurbo de Pekino. Li mortis de malriĉeco kaj malsano, post kiam li finverkis nur la antaŭajn 80 ĉapitrojn de tiu 120-ĉapitra romano. Poste literaturisto Gaŭ E (ĉ. 1738 -ĉ. 1815 p. K.) verkis la lastajn 40 ĉapitrojn laŭ la origina komponado de Caŭ Ŝjueĉin.

### KOMPILADO DE ENCIKLOPEDIOJ


Kompilado de enciklopedioj ankaŭ markis la kulturen prosperon de la dinastioj Ming kaj Ĉing. Ili estis "Jong Le Da Djan" kaj "Si Ku Ĉjŭan Ŝu".

Dum la erao Jongle (1403-1424 p. K.), imperiestro Ĉengzu de Ming-dinastio, ordonis kompili la enciklopedion "Jong Le Da Djan", kiu estis finkompilita post

kvin jaroj. Ĝi kolektis pli ol 7 000 specojn de verkoj pri klasikaĵoj, historio, filozofio, teatro, astronomio, geografio, medicino, aŭguro, agrikulturo, metio, tekniko, taoismo kaj budhismo. La enciklopedio konsistis el 22 937 volumoj (binditaj en 11 095 broŝuroj) kun 370 000 000 ideografiaĵoj. Ĝi kolektis antikvajn verkojn komplete aŭ paragrafe, tiel ĝi konservis grandkvante antikvajn originajn verkojn. Ĝi poste iom post iom perdiĝis, nun konserviĝas nur pli ol 100 broŝuroj, eksterlande kaj pli ol 200 enlande.

En 1772 p. K. oni komencis kompili la enciklopedion "Si Ku Ĉjŭan Ŝu" kaj plenumis tion post dek jaroj. Ĝi kolektis 3 457 specojn de verkoj kaj konsistis el 79 070 volumoj (binditaj en pli ol 36 000 broŝuroj). Ĝi havas tre vastan enhavon kaj konservas grandan kvanton da literaturaj materialoj.

(FINO)



Tarifo: 1 internacia respondkuponon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

\* Gelernantoj el la lernejo de Breil, 49490 Noyant, Francio, dez. kor. kun ĉinaj amikoj pri flugludiloj.

\* Korespondi deziras 13-jara knabino kun samaĝa knab(in)o Stephanie Poree, Maison du Rocher, 67 Bd Kennedy, 35400 SAINT MALO, Francio.

\* 26-j. studento de psikologio dez. kor. tm. Adreso: Janusz Marek Krupski, 91-037 Łódź, Lutomska 129 m. 132, Pollando.

\* 16-j. knabino vol. kor. tm. pri ĉiuj temoj Esperante, ruse kaj germane. Adreso: Emilka Witwer, Str. M. Ogińskiego 5B/2, 75-410 KOSZALIN, Pollando.

\* Jerzy Nowicki, Skr. poczt 230, 73-110 Stargard, Pollando, dez. kor. kun ĉinoj pri la han-lingvo.

\* 23-jara fraŭlo deziras amikecon tutmonde sendepende de sekso, nacionalismo, ktp. Adreso: Jose Luis Cristobal Diaz, C/Lopez de Hoyos no. 476, 28043 Madrid, Espana.

\* Mi volas korespondi kun viroj kaj virinoj. Adreso: Juho Vattulainen, 81150 Riihikangas, Roivas, Suomi (Finlando).

\* Fraŭlino 26-j. dez. kor. pri vivo kaj kutimoj de ĉinoj. Ilana Tytyk, ul. Malczewskiego 18/55, PL-43-300, Bielsko-Biala Pol. (Pollando)





# Memmasaĝo

de ŬANG JOŬJEN

**K**IEL scienca eksperimento konstatas, masaĝo povas reguligi la ekscitiĝon kaj inhibicion de la cerba kortiko, reguligi la nervajn sistemojn, plene stimuli la funkciojn de diversaj sistemoj de la organismo, pliigi la kvanton de hemoglobino, eritrocitoj kaj leŭkocitoj, ŝanĝi sangmovadon kaj metabolon kaj tiel prokrasti maljuniĝon de homoj.

Konu jenajn masaĝajn punktojn:

1. La punkto *bajhuj*, kiu troviĝas en la mezo de la verto, t.e., ĉe la intersekco de du linioj, unu iras meze inter la antaŭo kaj malantaŭo de la verto kaj la alia interkruciĝante kun la unua de la suproj de ambaŭ oreloj supren. Masaĝo de tiu punkto povas kuraci kapdoloron, kapturton, hipertension, neŭrastenion.

2. La punktoj *fengĉi*, kiuj troviĝas ambaŭflanke de la kolo, en kavetoj malantaŭe de la papiloj. Masaĝo de tiuj punktoj povas kuraci kapdoloron, okuldoloron, riniton, malvarmumon, apopleksion, hemiplecion, surdecon kaj orezumadon.

3. La punkto *ĉjuĉi*, kiu troviĝas ĉe la ekstera flanko de kubuto. Masaĝo de tiu punkto povas kuraci ŝveliĝon de la gorĝo, febron, hipertension, neŭrastenion, morbilon, hemiplecion, malfortiĝon de la brakoj, doloron de kubutoj kaj brakoj.

4. La punkto *nejĝuan*, kiu troviĝas ĉe la interna flanko de antaŭbrako kaj iom supre de la strioj de manradiko. Masaĝo de tiu punkto povas kuraci doloron ĉe la brusto, koronarian kormal-sanon, palpitation, stomakan do-




loron, naŭzon, vomadon, astmon kaj ŝveliĝon de la gorĝo.

5. La punkto *ĝong'ŭan*, kiu troviĝas ĉe la meza punkto de la kunligita linio inter la ksifoido kaj umbiliko sur la meza linio de la abdomeno. Masaĝo de tiu punkto povas kuraci gastriton, stomakan ulceron, abdomenan ŝveliĝon, vomadon, lakson, senapetitecon, dispepsion, hipertension kaj neŭrastenion.

6. La punkto *ĉjihaj*, kiu troviĝas iom sub la umbiliko. Masaĝo de tiu punkto povas kuraci abdomenan ŝveliĝon kaj doloron, nereguleco de menstruo kaj neŭrastenion.

7. La punkto *ŝanĝong*, kiu troviĝas inter la mamoj, sur la meza linio de la brusto. Masaĝo de tiu punkto povas kuraci tuson, sufokiĝan senton en la brusto kaj malfacilan spiradon, astmon kaj doloron ĉe la brusto.

8. La punkto *zusanli*, kiu troviĝas iom ekster la tibio sub genuo. Masaĝo de tiu punkto povas kuraci sufokiĝon kaj doloron de la abdomeno, senapetitecon, dispepsion, abdomenan ŝveliĝon kaj intestan bruon, vomadon kaj lakson, malfacilan urinadon, apopleksion kaj paralizon, hipertension, urtikarion, malfor-



## Ni havas monatan Esperantan kunsidon

de M. NISIDA (Japanio)



**H**ODIAŬ mi denove sendas al vi foton faritan en la 26-a de julio, kiu montras nian monatan kunsidon.

Lastatempe nia societo regule havas monatan kunsidon vespere de la kvara ĵaŭdo ĉiumonate, de la sesa kaj duono ĝis la naŭa en nia urbana domo, kaj ĉiuokaze kolektiĝas dek du aŭ dek tri membroj.

La unua programero estas legado de "El Popola Ĉinio", nome ĉeestantaj membroj sinsekve voĉlegas la gazeton. Precipe la horo estas zorgata de komencantoj, do neeviteble ni legas la artikolojn "Por Komencantoj" kaj "Mia

*La kvina de dekstre: S-ro Toida Naoki, prezidanto de Kjuŝu Esperanto*  
*La dua de dekstre: S-ro Mori Singo, peranto de EPC*  
*La kvara de maldekstre: S-ro Umezu Sumitaka, prezidanto de Hukuoka Esperanto Societo*  
*La unua de maldekstre estas la aŭtoro mem.*

Vivo" aŭ "Esp-novaĵoj". Por la legado ni pasigas unu horon.

Kiam ni trovas nekompreneblajn vortojn, progresintoj donas al ni konsilojn. Kaj kiam ni trovas interesajn aŭ unikajn esprimojn, ni kuraĝe interŝanĝas opiniojn.

La dua programero estas ĝojinda horo, nome tridek minutojn estas malpermesite krokodili.

Do, vole nevole oni devas paroli nur en Esperanto. La temo ne estas decidita, laŭokaze oni parolas pri diversaj temoj.

La tria programero estas raporto kaj informo pri nia movado. Ĉirkaŭ unu horon ni interkonsiliĝas pri Esperantaj movado kaj studado.

Tiamaniere ni pasigas signifoplenan horon en la kunsido.

tigon kaj doloron de la malsupraj membroj pro reŭmatismo.

9. La punkto *sanjinĝjaŭ*, kiu troviĝas ĉe la interna flanko de kruro, supre de maleolo. Masaĝo de tiu punkto povas kuraci neregulecon de menstruo, uteropozon, impotentcon, polucion, neŭrastenion, hipertension, sen-

dormecon kaj malfortecon de la stomako kaj lieno.


10. La punkto *jongĉjŭan*, kiu troviĝas en la antaŭa parto de plando. Masaĝo de tiu punkto povas kuraci doloron ĉe la verto, komaton, sunfrapon, nesufiĉan energion de la renoj.

Faru jenan masaĝon:

Masaĝu en direkto de hormontrolo ĉiujn supre diritajn punktojn po tridek fojoj de supre malsupren. Faru tion ĉiutage antaŭ enlitiĝo ĉ. dek minutojn, kaj samtempe frotu la vizaĝon kaj piedkavojn po 100 fojoj.

Faru la masaĝon laŭ via malsano. Se vi suferas hipertension aŭ koronarian malsanon, multe masaĝu la punktojn *bajhui*, *ĉjuĉi*, *nejĝŭan*, *ŝanĝong* kaj *zusanli*.

Nuntempe en Ĉinio pli kaj pli multaj homoj praktikas masaĝon. Nemalmultaj hospitaloj havas masaĝan sekcion. Eĉ en iuj hoteloj funkcias masaĝaj ĉambroj. La masaĝo estas tre utila por la sano de la homoj.







# Granda Muro, Dankon pro Via Edifo

de SAŬ BIN

## POEZIA ANTIKVA URBO

**N**IA trajno daŭre kuris sur la Okcidenta Koridoro de la Flava Rivero kaj atingis en vespero la urbon Ĝiŭĉjŭan meze de la gorĝo de la koridoro.

Ĝi estas poezia antikva urbo kun historio de du mil jaroj. Malpli ol unu kilometron for de la

orienta parto de la urbo kuŝas fonto kun forte levigantaj vezikoj, kiuj formas klaran lageton profundan ĉ. unu metron. Historiaj literaturoj diras, ke por komunikiĝi kun la Okcidenta Regiono imperiestro Udi de Han-dinastio sendis en 121 a. K. generalon Hŭo Ĉjubing militiri okcidenten kaj venkis hunojn. En la sama jaro estis fondita la prefektujo Ĝiŭĉjŭan. Laŭdire la 200 000 oficiroj

---

<b>laŭvorta traduko</b>	ne ili tre vol- ven- Ĉinio sed mi edzo 工作 很 忙, 女儿 上 学。” gōngzuò hěn máng, nǚer shàng xué.” laboro tre okupita filino vizit- lernejo
<b>Esp-a traduko</b>	Anna: “Neniam. Ili tre volas veni ĉi tien, sed ili estas multe okupitaj: mia edzo pri laboro kaj la filino pri vizitado de lernejo.”
<b>han-lingvo</b>	林 红: “欢迎 他们 方便 的 时候 到 中国 来。”
<b>HFA</b>	Lín Hóng: “Huānyíng tāmen fāngbiànde shíhòu dào Zhōngguó lái.”
<b>laŭvorta traduko</b>	bonven- ili oportuna tempo ven- Ĉinio
<b>Esp-a traduko</b>	Lin Hong: “Ili estos bonvenigataj, se ili vizitos nian landon en tempo oportuna al ili.”
<b>han-lingvo</b>	安娜: “谢谢。 他们 会 来 的。”
<b>HFA</b>	Annà: “Xiexie. Tāmen huì lái de.”
<b>laŭvorta traduko</b>	dank- ili pov- ven-
<b>Esp-a traduko</b>	Anna: “Dankon. Tre povas esti, ke ili venos.”

## klarigoj

- 和: konjunkcio, kun la signifo “kaj”, uzata por ligi du aŭ plurajn frazelementojn de sama naturo kaj funkcio kaj montri ilian kunordigan rilaton. Ligante pli ol du elementojn, ĝi devas esti metita antaŭ la lasta, dume la antaŭaj estas dividitaj per speciala interpunkcio “、”, kiun oni nomas “顿号” (dùnhào).
- 会: plursenca vorto. Ĉi tie ĝi estas verbo por esprimi deziron kaj eblecon. Ofta uzado estas: “...会 + verbo (adjektivo) ...”.



kaj soldatoj komandataj de li en la militiro, ĉiuj garnizonis ĉirkaŭ la laĝeto post la venko. Imperiestro Udi sendis dek botelojn da vino speciale por kortego por rekompenci ilin pro ilia merito. Estis malfacile dividi la vinon inter tiel multe da personoj. Hŭo do ordonis verŝi la vinon en la fonton, por ke ĉiuj trinku la akvon. Ekde tiam la loko akiris la nomon Ĝiŭĉjŭan (ĉinlingve Ĝiŭĉjŭan signifas "vina fonto").

La noktoluma pokalo kun historio de 3 000 jaroj estas rigardata kiel trezoro de Ĝiŭĉjŭan. Ĝi estas farita el delikate polurita jado de la monto Ĉjiljan kaj havas kolorojn verdan, malhelverdan, helflavan, flave verdan kaj laktoblankan. La pokalo estas maldika kiel ovoŝelo kaj travideble brilas en lumo, tial ĝi ricevis la nomon noktoluma pokalo.

La delikate farita pokalo produktiĝas per tre krudaj manoj de metiistoj. En laborejoj de la Metiarta Fabriko en Ĝiŭĉjŭan mi vidis, ke laboristoj prenas per tiuj krudaj manoj smirgon kaj tuŝigas la jadon al rapide turniĝanta drilo kaj smirga rado, por ĝin dispecigi kaj poluri. Tiuj junaj manoj de la okdekaj jaroj kreas grandan valoron, same kiel tiuj transportantaj ŝtonojn kaj lignojn por konstrui la Grandan Muron en la antikveco.

Mia akompananto estis 29-jara Ŝjaŭ Ĝeng, kiu funkcias kiel projektisto de la jadskulpta laborejo kaj prezidanto de la fabrika sindikato de laboristoj. Li estas junulo fervora kaj memfida. Li diris al mi, ke la noktoluma pokalo farita laŭ tradicia teknologio estas ŝatata de ĉinoj kaj eksterlandanoj kaj havas grandan debiton. Tamen ili ne kontentiĝas pri tio, sed penas por elfari novan metiartaĵon kun karaktero de la epoko konservante kaj disvolvante la bonan tradicion.

Eble ĉiu bona metiisto, antaŭ ol krei miraklon, devas havi en si ardan aspiron. Sur la vojo de Ĝiŭĉjŭan al la pasejo Ĝjajugŭan mi aŭdis jenan rakonton:

La pasejo Ĝjajugŭan estas granda konstruo sur la Granda Muro. Legendo diras, ke por kiel eble plej rapide konstrui la pasejon en ekstreme malfacila trafiko kaj malfavora klimato, la artistoj siatempe faris ĉion eblan: Ili ne sole prezentis projektajn planojn pri la konstruo kun racia aranĝo, pompa formo kaj fortika strukturo, sed eĉ faris precizan kalkulon pri bezonataj materialoj. Kiam la konstruo finiĝis, restis nur unu briko el

ĉiuj materialoj. Poste, ĝi estis uzata kiel memoraĵo por laŭdi la altan aspiron kaj grandan meriton de la konstruintoj kaj estas konservata ĝis hodiaŭ sur la breto de la malantaŭa parto de la paseja ronda muro.

## IMPONA PASEJO ĈE LA OKCIDENTA FINO DE LA GRANDA MURO

La pasejo Ĝjajugŭan estas la okcidenta ekstremo de la Granda Muro. Ĝi situas ĉe la monto Ĝjaju, branĉeto de la montaro Ĉjiljan.

Sude de la pasejo kuŝas eterne neĝokovrita Ĉjiljan-montaro kaj norde kontinue ondanta Mazong-montaro. Ĝi estis strategia loko en historio. Post sia fondiĝo Ming-dinastio (1368 — 1644), por fortikigi la militan defendon ĉe la Nordokcidento, starigis en 1372 la pasejon samtempe, kiam ĝi rekonstruis kaj etendigis okcidenten la Grandan Muron konstruitan en Ĉin- kaj Han-dinastioj. Ekde tiam la Granda Muro, kiu komenciĝas de la pasejo Ŝanhajgŭan en la oriento kaj finiĝas ĉe la pasejo Ĝjajugŭan en la okcidento, fariĝis granda antikva konstruo longa ĉ. 6 000 kilometrojn sur la norda tero de Ĉinio.

La paseja konstruaĵaro estas vasta kaj dividiĝas en urbetojn internan kaj eksteran. La orienta kaj okcidenta partoj havas po unu pordon kaj po unu turon. La kvar anguloj de la urbo havas po unu turon. Ĉe la mezaj partoj de la suda kaj norda muroj de la urbo estas lokita po unu gvatturo. En la okcidenta flanko de la urbo estas duoncirkla muro bazita sur ŝtono kaj tegita per brikoj. La aliaj tri flankoj estas ĉirkaŭitaj de tera muro. La suda kaj norda partoj de la urbo tuŝas la Grandan Muron kaj etendiĝas foren laŭ ondantaj montetoj, kio faciligas defendon. Starante sur turo kaj rigardante malproksimen, oni sentas, ke la urbo estas nekonkerebla.

Tamen la loko pensigas profunde, ke en la urbo estas teatra domo kun brikaj ekranoj ĉe ambaŭ flankoj, kiuj surhavas versparon:

*Historiaj pasejoj ree prezentiĝas,*

*Bono disde malbono klare distingiĝas.*

## BILDOJ DE HISTORIO

Per aŭto veturante de Ĝjajugŭan okcidenten laŭ la Lanĝouŝinĝjang-a Ŝoseo, oni povas vidi ruinojn de la Granda Muro de Han-dinastio, kiuj plejparte estas unuopaj gvatturoj aŭ bazamentoj

**SUDE KAJ NORDE  
DE LA  
GRANDA MURO**



sur Gobio. Tie miraĝoj aperis unu post alia en la arda suno. Post veturado de pli ol 400 kilometroj ni atingis la ŝtonkavernaron Mogaŭ de Dunhŭang, sur kies muro estas skulptitaj bildoj de la historio.

La ŝtonkavernaro Mogaŭ troviĝas oriente de de la monto Mingŝa 25 kilometrojn for de la gubernio Dunhŭang. Laŭ la notoj sur steleo de Tang-dinastio, la ŝtonkavernaro estis ekkonstruita en 366 p.K. pro hazarda okazaĵo. Legendo diras, ke bonzo Jŭe Zun el centra Ĉinio vojaĝis al la monto. Subite li vidis, ke sur la monto Sanŭej kvazaŭ aperis miloj kaj dek miloj da budhoj en la ora sunlumo. Li opiniis la monton sankta loko kaj per almozpeto kolektis grandan sumon da mono. Li venigis ŝtonhakistojn, por ke ili elhaku ŝtonkavernon sur la kruta muro de la monto Mingŝa. La faktoj pruvis poste, ke la ŝtonoj de la monto Sanŭej enhavas glimon. En la sunsubiro glimo ore brilas. Post multaj jaroj alia bonzo Faljang venis tien de la oriento kaj hakis la duan ŝtonkavernon. En Tang-dinastio (618 — 907) tie estis pli ol 1 000 ŝtonkavernoj, tial la ŝtonkavernaro havas alian nomon Milbudha Ŝtonkavernaro.

La ŝtonkavernaro Mogaŭ estas la plej granda kaj plej bone konservata en Ĉinio. Nun tie estas ankoraŭ konservataj 492 ŝtonaj kavernoj kun 2 450 skulptitaj budhoj kaj 45 000 kvadrataj metroj da freskoj. La bildoj montras diversajn flankojn de la ĉina socia vivo en la antikveco. Tial ili tute meritas la nomon Bildoj de Historio.

Tiuj ĉi unuopaj kaj rakontaj bildoj vidigas, kiel Ŝakjamunio sindoneme savis homojn antaŭ sia budhiĝo, kaj propagandis pri sinoferemo kaj asketismo. La freskoj estas plenaj de kruelaj, amaraj kaj pesimismaj enhavoj kaj forte prezen-

tas la fakton, ke ili kreigis en la jaroj, en kiuj ofte okazis militoj, la socio tumultiĝis kaj la popolo vivis en grandaj mizeroj kaj teruroj. Samtempe ili esprimas la vidpunktojn de la pentrintoj pri la tiama realo. Tamen la longtempa feŭda socio de Ĉinio havis ankaŭ pacan kaj prosperan periodon, ekz., la antaŭa periodo de Tang-dinastio. Tial la freskoj sur muroj de la ŝtonkavernaro elhakita en la dinastio ofte prezentas la mondon riĉan kaj prosperan.

Ĉie sur la muroj de la ŝtonkavernaro videblas freskoj de diversaj dinastioj pri militoj, kamplaboroj, komercado kaj popola vivo. Iuj freskoj detale rakontas pri la procezo de produkta laboro. Ĉiuj historiaj bildoj multe pensigas pri la vivo de niaj prapatroj kaj forte allogas la turistojn.

Ĉe la sunsubiĝo mi forlasis la lastan gvatturon ĉe la okcidenta fino de la Koridoro de la Flava Rivero, adiaŭis ĉion postlasitan de niaj grandaj antaŭuloj kaj ekveturis al nova loko, postkurante la ruĝan sunon.


Falis nokto. Tra Gobio regis plena mallumo. La luno leviĝis ĉe la horizonto en la oriento kaj aspektis tiel kvieta kaj tiel alloga. Subite mi eksentis, kiel forte similas al la luno la Granda Muro: Ĝi ne kreskigas ĉion, tamen edifas por ĉiam. Hodiaŭ en Ĉinio leviĝas la arda tajdo "Ami nian Ĉinion kaj ripari la Grandan Muron". Multaj laborunuoj kaj individuoj konkure ofertas monon kaj faras sian kontribuon por protekti kaj ripari la Grandan Muron. La Granda Muro edifas: Unuiĝo, kreivo kaj alta aspiro. La Granda Muro, kiel simbolo de la ĉina nacio, staros sur la ĉina tero generacion post generacio kaj vekos niajn posteulojn al la prosperigo de Ĉinio kaj daŭrigo de la revolucio por la bela morgaŭo.



SUDE KAJ NORDE DE LA GRANDA MURO (12)

# ĜAJUGŬAN-PASEJO



Fotoj de ŬANG ĜJANGONG



La Granda Muro sur dezerto

Antikva vojo ĉe la pasejo






La kaverno Mogaŭ ĉe Dunhŭang

Turistoj ĉe la Sonora Sablomonto








Ĝjajugŭan-pasejo

Strato de la  
urbo Ĝiŭĉjŭan



Ruino de antikva kamela  
urbo en malproksimo



# El la "Kanto pri la Ĉina Revolucio"




Junulinoj plenaj de fiero kaj sento dancas ĉe la Granda Muro por bonvenigi la estontecon de la patrolando.

Okaze de la 35-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, oni surscenigis en Pekino la grandtipan muzik-dancan epopeon "Kanto pri la Ĉina Revolucio".

Ĝi prezentas la heroan ĉinan revolucion batalon kaj la grandan socialisman konstruadon dum pli ol cent jaroj de la Opia Milito en 1840 ĝis nun, per alte konciza rimedo kaj grandiozaj scenoj. Ĝia arta formo estas ĉefe muziko kaj danco, krome ankaŭ literaturo, teatro, pikturo, skulpturo kaj filmo. Ĝin prezentis pli ol 1 400 personoj, inkluzive de certaj famaj muzikistoj kaj dancistoj.


Revoluciuloj aklamas la naskiĝon de la Komunista Partio de Ĉinio.









Kantado pri la ĝusta linio de la Tria Plena Sesio de la 11-a Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio



La Ĉina Laborist-Kampanara Ruĝa Armeo en la Longa Marŝo



La diversnaciecaj popolanoj akklamas la naskiĝon de la Ĉina Popola Respubliko.



La tuta popolo marŝas al la brila estonteco.

15-N

继起同学墨笔山水画可争物使墨色  
淋漓烟具风韵如字为念

